

3<sup>o</sup> JARO.

OCEANO

N<sup>o</sup> 9

# TRA LA MONDO.

• TUTMONDA • ILUSTRATA • REVUO • ESPERANTISTA •

MARTO

1908.

## GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

**TEATRO:** Kaprico, de *Alfred de Musset*, tradukita de *J. Flourens* (FRANCUJO).

**FELIETONO:** La fratoj de Mowgli, el « la libro de la Junglo », de *Rudyard Kipling*, tradukita de *C. W. Oxenford* (ANGLUJO).

**VIRINA PAGO,** La punktoj, de *Roksano* (FRANCUJO).

**LA KVARA,** laŭ leteroj de *la Kvaro*, *S<sup>ino</sup> M. Hankel*, *Sergius Winkelmann* (GERMANUJO).

**ĈIULANDA LITERATURO:** Oni mortigis Antikriston, de *Pastro J. N. Ktitaref* kaj *D<sup>ro</sup> J. Abramson* (RUSUJO). — La tago de la mortintoj, de *Hedvig Thielking* (GERMANUJO).

**PRI ESPERANTO:** Kroniko, Bibliografio, de *A. Montrosier* kaj *Steletto*.

**MIKSAĴOJ:** Ludoj, konkursoj, de *Ch. Brunet*.



Jara abono: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4.50 fr. (1,80 Sm.)  
La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Internaciaj **RESPOND-KUPONOJ** estas akceptataj kiel 25 cent (10 Sd.).

« Tra la Mondo » aperas **REGULE KAJ AKURATE** monatfine krom en Aŭgusto.

CAROLINE  
1907. OXFENFORD. EV.

# ATENTU, Sinjorino

vi ekdikigas, kaj dikigi estas maljunigi. Prenu do ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reigos svelta.


La flakono da 50 drageoj estas sendata aŭ franko de la : **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de **10 fr.** Kuracado sendanĝera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi : **THYROIDINE BOUTY.**

## ASP

### KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,  
Opertuna, Pura,  
Neestingebla  
en Ventego,  
Funkciadas bonege  
nur kiam oni uzas  
la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelerojn

145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas : 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeleroj kostas 4 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague.  
DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento :

Sro G. RUTTER, 30, Red  
Lion Squar, LONDON.



## VIVO DE JESUO

de ERNEST RENAN

laŭ la 78<sup>a</sup> milo franca tradukis

EMILIO GASSE

Mendebla ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilio Gasse,  
77, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe  
liaj korespondantoj :

British Esperantist, Germana Esperantisto,  
Ruslanda Esperantisto, Esperantisten, kaj Sro  
Karl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondantoj, mendoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn. Oni ankaŭ abonnu aŭ reabonu senpere pro la sama motivo.

Adreso : **Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O.), France.**

Urĝaj sciigoj : **REKLAMOJ, ANONCOJ**, k. a. devas alveni antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato, por la tuj elironta N<sup>o</sup>.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera

# Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de  
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

MILKA  
VELMA  
NOISETTINE

## Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANGĜI.



## ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista  
Kongreso. Genève 1906

Prezo : FRANCUJE. —  
11 f 50 la kesto da 2 boteloj  
Sen kosto pri transporto kaj  
impostoj.

ALILANDE. — 4 f ĉiu botelo  
prenita en S<sup>t</sup> Etienne,  
impostoj kaj transporto pluaj.

Generala Tenejo por  
Francujo kaj Fremdujo :

J. B. Brunon-Chauvet  
S<sup>t</sup> Etienne (France).

### TARIFO DE NIA PUBLIKIGADO.

Prezo je la linio	ANONCOJ : (33 literoj)	Por unu anonco :	0 fr. 75 ĉiulinie.
		Por 3 anoncoj almenaŭ	0 fr. 60 —
		Por la tuta jaro	0 fr. 50 —
	REKLAMOJ (50 literoj) :	2 fr. 50 ĉiulinie.	

Prezo je la paĝo (1 paĝo = 432 om. kv.)

	1 paĝo	1/2	1/4	1/8	1/16
Por unu anonco :	100 fr.	58 fr.	32 fr.	18 fr.	10 fr.
Por 3 anoncoj almenaŭ :	80 fr.	46 fr.	26 fr.	15 fr.	8 fr.
Por la tuta jaro :	50 fr.	30 fr.	16 fr.	9 fr.	5 fr.

Sendi la tekstojn kun la menda kosto al « Tra la Mondo », Meudon (S. & O.) France, antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato por la numero eliranta je la fino de l' monato.

#### NE KOMERCAJ ANONCETOJ.

1,25 fr. por 4 linioj enhavantaj ĉiu 33 literojn minimume. Ĉiu plua linio komencita kostas 0 fr. 25.

Pro la dislegado de « TRA LA MONDO » EN LA TUTA MONDO, tiuj anoncoj mal-karaj estas tre rekomendataj al la multaj filatelistoj kaj poŝtkartaj kolektistoj; pli ĝenerale al ĉiuj kolektistoj kaj al ĉiuj dezirantaj uzi Esperanton por havigi rilatulojn en fremdaj landoj, aŭ por dokumentiĝi: ni rekomendas ankaŭ tiujn anoncetojn al la grupestroj dezirantaj interrilatiĝi kun fremdaj samideanaj grupoj, kaj al la Esperantaj profesoroj, kies studentoj deziras trovi fremdajn korespondantojn por perfektigi en la lingvo per la internacia interkorespondado.

### FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE.

La Kio organizas dum 1908, kun la Agentejo Lubin, la jenajn ekskursojn :

**Italujo**, de 18 marto al 17 aprilo. Prezo (kun ĉiuj kostoj), 1<sup>a</sup> kl. 1080 fr.; 2<sup>a</sup> kl. 990. fr. — **Napolo, Sicilo kaj Napolo.** Deiro de Parizo, 25 marto kaj 15 aprilo. Prezo (k. ĉ. k.), 1<sup>a</sup> kl. 1100 fr.; 2<sup>a</sup> kl. 1000 fr. — **Bordo de la Mediteraneo**, de 11 ĝis 26 aprilo. Prezo (k. ĉ. k.), 1<sup>a</sup> kl. 550 fr.; 2<sup>a</sup> kl. 500 fr. — **Italujo (Sankta Semajno en Romo)**, de 13 aprilo ĝis 13 majo. Prezo (k. ĉ. k.), 1<sup>a</sup> kl. 1090 fr.; 2<sup>a</sup> kl. 990 fr. — **Alta Italujo kaj Italaj Lagoj**, de 29 aprilo al 24 majo. Prezo (k. ĉ. k.), 1<sup>a</sup> kl. 980 fr.; 2<sup>a</sup> kl. 890 fr.

Por sciigoj kaj biletoj sin turni al Agence Lubin, 36 Boulevard Haussmann, Paris.

La luksa vagonaro « Paris-Barcelona-Valencia », deiranta de Parizo ĉiunmerkredoj kaj ĉiuvendredoj, iras nun ĝis Kartageno, kun daŭrigo per ŝipo ĝis Oran (Alĝerio), kaj korespondaj ekspresaj vagonaroj al Alĝero.

Deiro de Parizo, merk. kaj vend. je 7 h. 20 vesp.; alveno en Kartageno, vend. kaj lunde je 8 h. 45 mat.; alv. en Oran samtage je 6 h. 45 vesp. (Sipveturo en 9 horoj).

Deiro de Oran, merk. kaj sab. je 8 h. 30 mat.; deiro de Kartageno, samtage je 10 h. 40 mat.; alveno en Parizo vend. kaj lunde je 10 h. 40 mat.

## Kaprico.

De ALFRED DE MUSSET. (1)

ŜAVINJI.

Ŝi do iris sen veturilo ?

srino DE LERI.

Ne, mi al ŝi pruntedonis 'a mian. Ĉu vi legis tion ĉi, S<sup>no</sup> de Ŝavinji ?

ŜAVINJI.

Kion ?

srino DE LERI.

Ĝi estas la *Revue de l' Du Mondo*; tre belela artikolo de S<sup>rino</sup> Sand pri la orangutangoj (2).

ŜAVINJI.

Pri la ?...

srino DE LERI.

Pri la orangutangoj. Ha ! mi eraras, ĝi ne estas de ŝi, ĝi estas la apuda ; tre amuza ĝi estas.

ŜAVINJI.

Mi neniel komprenas tiun ideon, iri en la balon, ne min antaŭsciiginte pri tio. Almenaŭ mi estus rekondukinta ŝin.

srino DE LERI.

Ĉu vi ŝatas la romanojn de S<sup>rino</sup> Sand ?

ŜAVINJI.

Ne, tute ne. Sed se ŝi estas tie, kiel fariĝis ke mi ne ŝin trovis ?

srino DE LERI.

Kion ? la revuon ? Ĝi estis sur tio ĉi.

ŜAVINJI.

Ĉu vi mokas min, sinjorino ?

srino DE LERI.

Eble ; restas nur la demando pri kio.

ŜAVINJI.

Pri mia edzino mi parolas al vi.

srino DE LERI.

Ĉu vi komisiis, ke mi ŝin gardu.

ŜAVINJI.

Vi estas prava ; mi estas tre ridinda ; mi tuj iros por ŝin serĉi

srino DE LERI.

Senutile ! Vi estos haltigata de l' veturilvicirado.

ŜAVINJI.

Tio estas vera ; pli saĝe mi agos atendente, kaj mi atendos.

Li sin metas apud la fajrujon kaj sidigas.

srino DE LERI, ĉesigante sian legadon.

Ĉu vi scias, sinjoro de Ŝavinji, ke vi multe mirigas min ? Ŝajnis al mi, ke laŭ via diro, vi lasas Matildon tute libera, kaj ke ŝi iras, kien ŝi volas.

ŜAVINJI.

Certe ; pri tio vi vidas pruvon.

srino DE LERI.

Ne multe ; vi ŝajnas furioza.

ŜAVINJI.

Mi ? Ĉu estas eble ! kiel eble plej malplimulte !

srino DE LERI.

Vi ne povas resti senmove sur via brakseĝego. Mi vin juĝis tute alia viro, mi konfesas ; kaj serioze parolante, mi ne estus pruntedoninta mian veturilon al Matildo, se mi estus sciinta, ke tiel estas.

ŜAVINJI.

Sed mi certigas, ke tion mi opinias tre natura, kaj mi dankas, ke vi ĝin faris.

srino DE LERI.

Ne, ne, vi ne min dankas ; mi certigas, mi, ke vi estas malkontenta. Por diri al vi la veron, mi kredas ke ŝi eliris, iom en la celo rekuniĝi kun vi.

ŜAVINJI.

Tion mi tre ŝatas ! Kial ŝi ne min akompanis ?

srino DE LERI.

He jes ! Mi tion diris al ŝi. Sed tiaj ni estas, ni : ni ne volas, kaj poste ni volas. Reale, vi ne trinkas teon ?

ŜAVINJI.

Ne, ĝi malsanetigas min.

srino DE LERI.

Nu ! Donu iom da ĝi al mi.

ŜAVINJI.

Kiel, sinjorino ?

srino DE LERI.

Donu iom al mi.

Ŝavinji leviĝas kaj plenigas tason, kiun li proponas al S<sup>rino</sup> de Leri.

srino DE LERI.

Bone ; ĉi tien metu ĝin. Ĉu la ministraro kunsidas hodiaŭ vespere ?

ŜAVINJI.

Mi ne scias.

srino DE LERI.

Tuj ministrejoj estas strangaj gastejoj. Ilin oni

(1) Sekvo. Vidu la *Januaran Numeron*. — (2) *Fr. kaj Ang. : orang-outang. — It. : oran-gotango. Hisp. : orangutan.*

eniras kaj eliras ne sciante kial; tio estas procesio da marionetoj.

ŜAVINJI.

Viavice trinku do tiun ĉi teon; ĝi estas jam duone malvarma.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

En ĝin vi ne metis sufiĉe da sukero. Metu unu aŭ du pecojn.

ŜAVINJI.

Kiel vi volos; ĝi estos malbonega.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Bone; nun, ankoraŭ iom da lakto.

ŜAVINJI.

Ĉu vi estas kontentigita?

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Nun unu guton da varma akvo. Ĉu farite? Donu al mi la tason.

ŜAVINJI, prezentante la tason.

Jen; sed ĝi estos malbonega.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Ĉu vi kredas? Ĉu vi pri tio estas certa?

ŜAVINJI.

Pri tio estas neniam dubo.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Kaj kial ĝi estos malbonega.

ŜAVINJI.

Tial ke ĝi estas malvarma kaj tro sukerita.

Ŝavinji staras, tenante la tason; S<sup>rino</sup> de Leri ridante lin rigardas.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Ha! Dio mia! kiel vi min amuzas! Neniam mi vidis ion tiel malafablan.

ŜAVINJI, senpacienca ĵetas la enhavon de la taso en la fajron, poste grandpaŝe promenas, kaj malbonhumore diras:

Mian fidon, tio estas vera, mi estas nur malspritujo.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Neniam mi estis vidinta vin ĵaluzan, sed ĵaluza vi estas kiel Othello.

ŜAVINJI.

Kiel eble plej malmulte; mi ne povas toleri, ke oni sin ĝenu, nek ke oni ĝenu iel la aliajn. Pro kio vi kredas, ke mi estas ĵaluza?

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Pro memestimo, kiel ĉiuj edzoj.

ŜAVINJI.

Ho! virina diraĵo. Oni diras: « Ĵaluza pro memestimo » ĉar tio estas frazo tute farita, kiel oni diras: « Via tre humila servanto. » La homoj estas tre severaj por la kompatindaj edzoj.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Ne tiel multe, kiel por la kompatindaj edzinoj.

ŜAVINJI.

Ho! Dio mia, jes vere. Ĉio estas rilata. Ĉu oni povas permesi, ke la virinoj havu la samajn rajtojn kiel ni? Tio estas evidenta absurdaĵo. Estas mil aferoj tre gravaj por ili, kiuj estas tute negravaj por viro.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Jes, la kapricoj, ekzemple.

ŜAVINJI.

Kial ne? Nu! jes, la kapricoj. Estas certe, ke viro povas havi kelkajn, kaj virino....

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Havas kapricojn kelkfoje. Ĉu vi kredas, ke robo estas talismano, kiu antaŭgardas kontraŭ ili.

ŜAVINJI.

Ĝi estas barilo, kiu devas ilin haltigi.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Escepte se ĝi estas vualo kovranta ilin. Mi aŭdas, ke iu marŝas. Ĝi estas Matildo, kiu revenas.

ŜAVINJI.

Ho! ne; ne estas noktomeze.

Servisto eniras kaj donas paketon al S<sup>rino</sup> de Ŝavinji

ŜAVINJI.

Kio estas tio? Kion oni deziras de mi?

LA SERVISTO.

Tion oni ĵus alportis por via Grafa moŝto.

Li eliras Ŝavinji malfaras la paketon enhavantan la monsaketon de Matildo.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Ĉu ankoraŭ donaco vin trafas? Je tiu ĉi horo, tio estas iom skandala.

ŜAVINJI.

Kion do tio signifas? He! Francisko, he! kiu alportis tiun ĉi paketon?

LA SERVISTO, enirante.

Sinjoro?

ŜAVINJI.

Kiu alportis tiun ĉi paketon?

LA SERVISTO.

Sinjoro, la pordisto ĵus suprenportis ĝin.

ŜAVINJI.

Ĉu nenio estas kun ĝi? Ĉu ne estas letero?

LA SERVISTO.

Ne, sinjoro.

ŜAVINJI.

Ĉu de longe tiu pordisto tion havis?

LA SERVISTO.

Ne, sinjoro; oni ĵus donis ĝin al li.

ŜAVINJI.

Kiu ĝin donis al li ?

LA SERVISTO.

Sinjoro, li ne scias.

ŜAVINJI.

Li ne scias ! Ĉu vi freneziĝas ? Ĉu viro aŭ virino ?

LA SERVISTO.

Ĝi estas servisto en livreo, sed li ne konas lin.

ŜAVINJI.

Ĉu tiu servisto estas malsupre ?

LA SERVISTO.

Ne, sinjoro : li foriris senatende.

ŜAVINJI.

Ĉu li nenion diris ?

LA SERVISTO.

Ne, sinjoro.

ŜANINJI.

Bone.

La servisto eliras.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Vere oni vin amzorgas, sinjoro de Ŝavinji. Se vi lasas fali vian monon, tio ne estos la kulpo de tiuj sinjorinoj.

ŜAVINJI.

Mi volas, ke oni min pendigu, se ion mi komprenas al tio.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Silentiĝu ! vi ŝajnigas vin naivulo.

ŜAVINJI.

Ne ; per mia honoro mi certigas, ke mi ne divenas. Nepre tio estas eraro.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Ĉu la adreso ne estas sur tio ?

ŜAVINJI.

Mian fidon ! jes, vi estas prava. Tio estas stranga ; la skribon mi konas.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Ĉu oni povas vidi ?

ŜAVINJI.

Ĝin montrante al vi mi faras eble maldiskretaĵon ; sed tiom pli malbone por kiu tion riskas. Rigardu. Ie mi certe vidis tiun ĉi skribon.

S<sup>ino</sup> DE LERI.

Kaj mi ankaŭ tre certe.

ŜAVINJI.

Atendu do.... Ne, mi eraras. Ĉu ĝi estas klinita aŭ kuranta skribo ?

S<sup>ino</sup> DE LERI.

Fi do ! ĝi estas perfekta kursiva skribo. Rigardu kiel delikataj estas tiuj ĉi literoj ! Ho ! La sinjorino estas bone edukita.

ŜAVINJI.

Ŝajnas, ke vi ŝin konas.

S<sup>ino</sup> DE LERI, kun ŝajniga konfuzo.

Mi ! tute ne.

ŜAVINJI, mirigita, ŝin rigardas, poste daŭrigas sian promenadon.

S<sup>ino</sup> DE LERI.

Pri kio do ni interparolis ? — He ! al mi ŝajnas, ke ni parolis pri kaprico. Tiu amdonaceto alvenas en favora momento.

ŜAVINJI.

Vi konas la sekreton, konsentu pri tio.

S<sup>ino</sup> DE LERI.

Estas personoj, kiuj nenion scias fari. Se mi estus vi, mi estus jam diveninta.

ŜAVINJI.

Nu ! Estu malkaŝema, diru kiu estas.

S<sup>ino</sup> DE LERI.

Mi volonte kredus, ke ĝi estas S<sup>rino</sup> de Blenvilo.

ŜAVINJI.

Vi estas senkompata, sinjorino ; eksciu ja, ke ni malpaciĝos.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Tion mi esperas, sed ne tiun ĉi fojon.

ŜAVINJI.

Ĉu vi ne volas min helpi solvi la enigmon ?

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Bela okupo ! Lasu do tion ; oni kredus, ke vi al tio ne estas kutiminta. Vi repensados pri la samo, kiam vi estos kuŝiĝinta, almenaŭ nur pro ĝentileco.

ŜAVINJI.

Ne estas do plu da teo ? Mi deziras trinki ĝin.

S<sup>ino</sup> DE LERI.

Mi ĝin preparos por vi ; diru do ke mi ne estas kompleza !

Silento.

ŜAVINJI, ĉiam promene.

Ju pli mi serĉas, des malpli mi trovas.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

He ! diru do, ĉu vi antaŭdecidis pensi nur pri ĉi tiu monsaketo ? Mi tuj vin lasos en via revado.

ŜAVINJI.

Vere mi estas surprizegata.

S<sup>rino</sup> DE LERI.

Mi diras, ke ĝi estas S<sup>rino</sup> de Blenvilo. Ŝi pripensis pri la koloro de sia monsaketo, kaj alian ŝi sendas al vi pro pento. Aŭ eble pli ĝuste : ŝi volas vin tenti, kaj vidi, ĉu vi portos tiun ĉi aŭ la ŝian.

Daŭrigota.

Tradukita de

JOHANINO FLOURENS,

H. M. de la E. Vagabonda Klubo.



POST LA VIZITO DE SIA REĜA MOŝTO EN PARKHOTEL.

## Ĉirkaŭ la Kvara Kongreso

16<sup>a</sup>-22<sup>a</sup> de Aŭgusto 1908.

Jen kelkaj sciigoj pri la kongreso:

Malgraŭ la stato, ne tro bona de sia farto, Dro Zamenhof ĉeestos la kvaran, kiu komenciĝos dimanĉe per diservoj.

La programo enhavas paroladojn, deklamojn, kantojn kaj teatraĵojn, t. e. multajn okazojn por aŭdi nian lingvon.

Oni promesas ankaŭ multajn okazojn por interparoli kaj agrable interfratiĝi: ekzemple ekskursoj vaporŝipe al Meissen (1) kaj

al la saks-a Svisujo estas de nun organizataj.

Oni zorgos ankaŭ por ke, en Dresdeno, la gekongresanoj estu ĉiam kune. Por ke ili ne erare vagadu en la granda urbo, 24, *politikanoj de nun fervore lernas la lingvon.*

Ĉiuj ali-aj preparoj estas vigle plenumataj. Ĉiinda estas la « sigelmanko » por la kvara, elektita inter 140 desegnaĵoj de la studentoj de la Reĝa Arĥitektura Lernejo. La ideo pri la konkurso estas bonega.

Ĉiuj projektoj montras intereson kaj komprenon pri nia afero; multaj el ili estas spritaj kaj talentaj. Cetere la kongresanoj vidos ilin en granda kongresa ekspozicio, por kies bona organizacio la kvoro petegas energian helpon de ĉiuj.

*Laŭ letero de « la Kvoro por la Kvara ».*

**Kongresa kunsido de la tutmondaj instruistoj.**



PARKO DE L' HOTELO.

La organizo de tiu grava kunsido, laŭ iniciato de Sinjoro Cowper, vicprezidanto de Brita Esperanta Asocio, estas komisiita al la « klubo de la instruistoj en Dresdeno ». La interesatoj sendu siajn nomojn, adresojn, fakojn de l' instruado, k. t. p. al la klubo al la suba adreso.

*El letero de S<sup>ro</sup> Karl Schönherr, instruisto en Dresden, Lössnitzstrasse 22II.*

(1) Eks sidejo de la saksaj princoj. Meissen enhavas ĉefpreĝejon de la XIII<sup>a</sup> jarcento kaj rimarkindan kastelon.

## ESPERANTO VILAĜO. WEISSER HIRSCH.

Ĉu, flanke de niaj kongresoj, ni ne povos havi ian Esperantujon, ian urbelon trankvilan senbruan, kien dum la someraj liberlempaj monatoj kunvenus esperantistoj ĉiulandaj?

CAMILLE AYMONIER.

Tiu ideo de nia distinginda samideano estis favore akceptata en Kembriĝo, kaj kiam la elekto de Germanujo por la kvara estis certa, kaj preskaŭ certa tiu de Dresdeno, oni multe parolis pri la Esperanta vilaĝo elektinda kaj, kompreneble nia Dresdena amiko, S<sup>ro</sup> Sergius Winkelmann, estis multe demandata pri tio en Londono. El letero afable sendita de li, mi eltiras kelkajn interesajn sciigojn:

Weisser Hirsch (Blanka Cervo) estas internacia kuraĵloko konata (1), kien revenas ĉiujare malnovaj gastoj kaj ankaŭ multe da novaj. Ĉarma kampodoma kvartalo inter foliriĉaj arboj kaj kreskaĵoj afable impresas kaj akceptas la alvenantajn gastojn. Jam de malproksime ĝi salutas ilin per densa foliaro.

Oni ne kredu, ke nur malsanuloj loĝas en tiu ĉi bela loko. La amantoj de freŝeco ĝin ŝatas. Kaj certe, pensas nia samideano, tiel faros niaj internaciaj geamikoj post la multaj kaj iom lacigaj alternoj kongresaj. « Tie ili povos ripozi, forĵeti la lacigan kongresan aeron, ĝui la puran arbaran, fari promenadojn en la ravaj pejzaĝoj de nia vilaĝo, formi gajajn rondetojn, en kiuj la ĉefa parolo ne devos esti: kian kunvenon ni havas, aŭ kien ni devas iri; sed kie ni aranĝos festojn, balojn, koncertojn, paroladojn.

La belege kuŝanta kuraĵloko kuŝas sur la alta plataĵo de la granda arbaro *Dresdener Heide*, malsupre de kiu fluas Elb' proksime de la verda pina arbaro. Meze de la belega arbaro estas granda publika banejo kun bano kaj pluvbano (duŝo). Apud la koncertpromenado staras trinkejo, starigita en la vitrokovrita promenhalo. La ĉirkaŭanta arbaro invitas je belaj promenadoj. Belajn tagajn ekskursojn oni povas ankaŭ entrepreni en la ĉiekonatan Saksan Boheman Svisujon.

Piegrave estas, ke ni povos atingi la kongresurbon per la tramo en 45 minutoj, ĝui ĝiajn artajn kolektojn, ĉeesti en ĝia mond fama operdomo unurangajn teatrajn prezentadojn kaj koncertojn, unuvorte pasigi agrable la tempon, se la vetero estos malbela.

Do vere riĉa en beleco kaj allogaĵoj, estas nia Esperantujo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj tiu ĉi ĉarmeco, tiu ĉi beleco estos ankoraŭ multe pligrandigitaj per la ĉeesto de esperantistoj venintaj el ĉiuj landoj kaj mondpartoj, por vivi kelkatempe en efektivigita Esperantolando, en kiu ĉiu aŭdos nur la belajn sonojn de nia lingvo ».

Laŭ letero de S<sup>ro</sup> Sergius Winkelmann.

Jen nun kelkaj praktikaj sciigoj, donitaj de la Kvaro. La ĉiutaga unupersona nutrado kostos kie ajn 5 frankojn (2 sm.). La menuo plaĉos al la legomemuloj! « bona sed malmulte da viando, multe da legomoj, mallonga vico da manĝaĵoj. »


La sola diferenco de la prezoj okazos per la loĝado: de 1 fr. 25 (50 sd.) ĝis 7 fr. 50 (3 sm.) tage.

Oni ne povos lueendi la ĉambrojn antaŭ Julio pro la senĉesaj alvenoj kaj foriroj de la fremduloj.

El letero de S<sup>ino</sup> M. Hankel.

### Por la Kongresa kaso.

Ni ricevis, de malavara samideano, kiu deziras nepre resti nekonata, la sumon da 100 FRANKOJ (40 Sm.) por la kongresa kaso. Ni ĝojas pro la agrabla misio al ni donita, kaj estos feliĉa, se ni ricevos aliajn sumojn, ĉiuvolorajn, por transsendi al la « Kvaro ».



STALŝNUREGA FERVOJO.

(2) Ne tiel tamen kiel Wiesbaden (Germ.), aŭ Vichy kaj Aix-les-Bains (Franc.).

# La Fratoj de Mowgli.

Verkita de la famega angla aŭtoro RUDYARD KIPLING.

Bagheera, kies okuloj kaj oreloj estis ĉie, iom sciis pri tio, kaj avertis Mowgli'on, ke Shere Khan mortigos lin ian tagon; sed Mowgli ridis, kaj respondis: «Mi havas la Aron kaj mi havas cin; kaj Baloo, kvankam li estas tiel mallaborema, eble farus unu aŭ du frapojn por mi. Kial do mi timus?»

Tre varman tagon, okazis ke nova ideo venis al Bagheera — naskita de io, kion li estis aŭdinta. Eble Ikki la Erinaco estis dirinta ĝin al li; sed li diris al Mowgli, kiam ili estis en la profundo de la Junglo, dum la knabo kuŝis kun sia kapo sur la belega nigra felo de Bagheera: «Frateto, kiom ofte mi diris al ci, ke Shere Khan estas cia malamiko?»

«Tiom multe da fojoj, kiom estas nuksoj sur tiu palmo,» respondis Mowgli, kiu, nature, ne povis kalkuli. «Kio pri tio? Mi estas dormema, Bagheera, kaj Shere Khan tute estas longa vosto kaj laŭta parolo, simile al Mao, la Pavo.»

«Sed nun ne estas la tempo por dormi. Baloo scias; mi scias; la Aro scias; kaj eĉ la malsaĝaj, malsaĝaj cervoj scias. Tabaki ankaŭ estas dirinta tion al ci.»

«Ho! Ho!», diris Mowgli, «Tabaki venis al mi antaŭ ne longe, malĝentile dirante, ke mi estas nuda ido de homo, kaj ne taŭgas fosi por pork-nuksoj; sed mi ekkaptis Tabaki'on ĉe lia vosto, kaj frapis lin dufoje kontraŭ palmarbon, por instrui lin, kiel konduki sin pli bone.»

«Tio estis malsaĝa; ĉar kvankam Tabaki estas malbonfaranto, li estus dirinta al ci ion, kio estas grava por ci. Malfermu ciajn okulojn, Frateto! Shere Khan ne kuraĝus mortigi cin en la Junglo; sed memoru, Akela estas tre maljuna, kaj baldaŭ alvenos la tago, kiam li ne plu estos Estro. Same, multaj el la lupoj, kiuj akceptis cin, kiam ci estis unue kondukita al la Konsiliĝo, estas maljunaj, kaj la junaj lupoj kredas, kiel Shere Khan ĉiam pri tio instruas ilin, ke homido ne havas ian lokon en la Aro. Post ne longe ci estos viro.»

«Kia do estas viro, por ke li ne povu kuri kun siaj fratoj?», diris Mowgli. «Mi naskiĝis en la Junglo, kaj ne estas lupoj de nia Aro, el kies piedegoj mi ne eltiris dornon. Certe ili estas miaj fratoj!»

Bagheera streĉis sin, kaj duone fermis siajn okulojn. «Frateto,» diris li, palpu sub mian makzelon.»

Mowgli levis sian fortan brunan manon, kaj ĝuste sub la silkeca mentono de Bagheera, kie la grandegaj muskoloj estas ŝirmataj de la brilaj haroj, li trovis malgrandan senharan lokon.

«Neniu en la Junglo scias, ke mi, Bagheera, portas tiun markon — la marko de la ĉirkaŭkolo; tamen, Frateto, mi naskiĝis ĉe homoj, kaj ĉe homoj mia patrino mortis, en sia kaĝo en la Palaco de l' Reĝo, ĉe Oodeypore. Ĝi estas pro tio, ke mi pagis la prezon por ci, ĉe la Konsiliĝo, kiam ci estis nuda ideto. Jes, mi naskiĝis ĉe homoj. Mi neniam vidis la Junglon. Ili nutris min de post feraj bariloj, ĝis en nokto mi sentis, ke mi estas Bagheera, la Pantero, kaj ne ia ludilo por homoj; tial mi rompis la mal-

fortan seruron per unu frapo de mia piedego, kaj forkuris; kaj, ĉar mi estis lerninta la kutimojn de homoj, mi iĝis pli timeginda en la Junglo, ol Shere Khan. Ĉu ne vere?»

«Jes», diris Mowgli, «la tuta Junglo timas Bagheera'on — ĉiuj krom Mowgli.»

«Ho, ci estas ido de homo,» diris la Nigra Pantero, tre dolĉege; «kaj same kiel mi revenis mian Junglon, tiel fine ci devos reiri al homoj — al la homoj, kiuj estas cial fratoj — se ci ne estos mortigita ĉe la Konsiliĝo.»

«Sed kial, sed kial iu dezirus mortigi min?» demandis Mowgli.

«Rigardu min,» respondis Bagheera; kaj Mowgli rigardadis lin sensanceliĝe inter la okulojn. La granda pantero turnis sian kapon post duonminuto.

«Tio estas la tialo,» li diris, movante sian piedegon inter la folioj. «Ne eĉ mi povas cin rigardadi vizagen, kaj mi naskiĝis ĉe homoj, kaj mi amas cin, Frateto. La aliaj malamegas cin, ĉar iliaj okuloj ne povas rigardi la cialn; ĉar ci estas saĝa; ĉar ci eltiris dornojn el iliaj piedoj — ĉar ci estas homo.»

«Mi ne sciis tion ĉi,» diris Mowgli, kolerete; kaj li sulkigis siajn dikajn nigrajn brovojn.

«Kio estas la Leĝo de la Junglo? Unue frapu kaj tiam ekkriu. Pro cia senzorgemeco, ili scias, ke ci estas homo. Sed estu saĝa. Estas en mia koro, ke tiam, kiam Akela maltrafos sian proksiman mortigon — kaj je ĉiu ĉaso pli malfacile li venkas la cerviviron — la Aro turnos sin kontraŭ li kaj kontraŭ ci. Ili alvokos Junglan konsilantaron ĉe la Stonego, kaj tiam — kaj tiam — mi scias!» kriis Bagheera, levante sin. «Iru rapide al la dometoj de l' homoj en la valo, kaj prenu kelke da Ruĝaj Floroj, kiujn ili kreskigas tie, tial ke kiam alvenos la tempo, ci povos havi eĉ pli fortan amikon ol mi, aŭ Baloo, aŭ tiuj el la Aro, kiuj amas cin. Haviĝu la Ruĝan Floron.»

Per Ruĝa Floro Bagheera signifis fajron, ĉar neniu estaĵo en la Junglo nomas fajron per ĝia ĝusta nomo. Ĉiu besto treege timas ĝin, kaj eltrovas cent nomojn por preparoli ĝin.

«La Ruĝa Floro?» diris Mowgli, «kiu kreskas ekster iliaj dometoj dum la krepusko. Mi haviĝos kelkajn.»

«Tiel parolas la homido,» diris Bagheera fiere. «Memoru, ke ĝi kreskas en potetoj. Rapidu haviĝi unu, kaj gardu ĝin apud ci por la bezontempo.»

«Bone!» respondis Mowgli. «Mi iras. Sed ĉu ci estas certa, ho, mia Bagheera» — li metis sian brakon ĉirkaŭ la belegan kolon, kaj profunde rigardis en la grandajn okulojn — «ĉu ci estas certa, ke tio ĉi estas la faro de Shere Khan?»

«Je la nomo de la rompita seruro, kiu liberigis min, mi estas certa, Frateto.»

«Do, je la nomo de la Bovoviro, kiu aĉetis min, mi plene pagos Shere Khan'on por tio ĉi, kaj eble iom plie,» diris Mowgli, kaj li forkuregis.

«Tiu estas viro. Tiu estas tute viro;» diris Bagheera al si mem, ree kuŝiĝante. «Ho, Shere

(1) Sekvo. Vidu la Februaran numeron. Tiu traduko estas verkita kaj publikigata kun la afabla permeso de la aŭtoro, kaj de la eldonistoj Sroj Macmillan kaj K<sup>o</sup>, London.



Khan, neniam estis pli malbona ĉaso ol cia ranĉaso antaŭ dek jaroj!»

Mowgli estis malproksime, malproksime tra la arbaro, kuranta forte, kaj lia koro estis varmega. Li alvenis la kaverno, ĵus kiam la vespera nebuleto leviĝis, spiregis kaj rigardis tra la valo. La lupidoj forestis, sed Patrino Lupino, en la kaverno, sciis ke io ĉagrenas sian ranon, pro lia spirego.

«Kio estas, Filo?» ŝi diris.

«Ho, ia vespert-babilaĵo pri Shere Khan,» li respondis. «Mi ĉasas inter la plugataj kampoj hodiaŭ vespere,» kaj li sin repuŝis malsupre tra la arbaretajoj, al la rivereto ĉe la fundo de la valo. Tie li haltis, ĉar li aŭdis la kriegon de la Aro ĉasanta, aŭdis la blekegon de ĉasata Sambhur, kaj la ekronkon de la besto kiam ĝi turniĝas repuŝite. Tiam estis maldolĉaj, malbonaj blekoj de la junaj lupoj: «Akela! Akela! Permesu al la Sola Lupo, ke li montru sian fortecon. Loko por la Estro de la Aro! Eksaltu, Akela!»

La Sola Lupo sendube eksaltis, kaj maltrafis, ĉar Mowgli aŭdis la krakon de liaj dentoj kaj tiam krimon, kiam Sambhur forfrapis lin per sia antaŭpiedo.

Li ne plu atendis, sed kuregis antaŭen; kaj la blekoj iĝis pli kaj pli mallaltaj, dum li kuris sur la kulturataj landoj, kie loĝas la vilaĝanoj.

«Bagheera diris la veron,» li spiregis, dum li kuŝis inter ia brutmanĝaĵo apud la fenestro de dometo. «Morgaŭ estos grava tago por Akela kaj por mi.»

Tiam li pliproksimigis sian vizaĝon al la fenestro, kaj vikle observis la fajron sur la fajrejo. Li vidis la edzinon de la terkulturisto, leviĝi dum la nokto, por nutri ĝin per nigraj buloj; kaj kiam tagiĝis, kaj la nebuletoj estis blankaj kaj malvarmaj, li vidis la infanon de la viro, preni salikan poton, ŝmiritan

interne de tero, pleniĝi ĝin je buloj el ruĝ-brula karbo, meti ĝin sub sian lan-kovrilon, kaj eliri por atenti la bovovirojn en la brutejo.

«Ĉu tio estas ĉio?» diris Mowgli. «Se ido povas fari tion, estas nenio por timi, tial li marŝis ĉirkaŭ la angulo, kaj renkontis la knabon; li elprenis el lia mano la poton, kaj malaperis en la nebulo, dum la knabo kriegis pro teruro.

«Ili tre similas al mi,» diris Mowgli blovante al la poto, kiel li estis vidinta la virinon fari. «Tio ĉi mortos, se mi ne donos al ĝi aĵojn por manĝi»; kaj li faligis branĉetojn kaj sekan arbŝelon sur la ruĝaĵon. Duone supre de la monto li renkontis Bagheera'on, sur kies felo la matena roso brilis kiel lunŝtonoj.

«Akela maltrafis,» diris la Pantero. «Ili estus mortigintaj lin la lastan nokton, sed ili ankaŭ cin bezonis. Ili serĉis cin sur la monto.»

«Mi estis sur la plugataj kampoj. Mi estas preta. Ci vidu!» Mowgli montris la fajropoton.

«Bone! Nun, mi estas vidinta homon puŝi sekan branĉon en tiun aĵon, kaj tuj la Ruĝa Floro floris ĉe la pinto. Ĉu ci ne timas?»

«Ne. Kial mi timus? mi memoras nun,—se ne estas sonĝo,—kiel, antaŭ ol mi estis lupo, mi kuŝis apud la Ruĝa Floro, kaj ĝi estis varma kaj plaĉa.»

La tutan tagon Mowgli sidis en la kaverno, atentante sian fajropoton, kaj trempante sekajn branĉojn en ĝin, por vidi kiel ili aperos. Li trovis branĉon, kiu lin kontentigis, kaj en la vespero, kiam Tabaki venis al la kaverno, kaj diris al li, ke oni bezonas lin ĉe la Konsila Ŝtonego, li ridis ĝis Tabaki forkuris. Tiam Mowgli iris al la Konsilo, ankoraŭ ridante.

C. W. OXENFORD.

Prezidantino de «E. Vagabonda Klubo»,

Daŭrigota.

Anglujo.

## BIBLIOGRAFIO.

**Literaturo.** — *La Rabistoj* de Schiller, represo de la traduko de D<sup>ro</sup> Zamenhof aperinta en «La Revuo», 2 fr. — *Libraro pacifisma*: Por Arbitracio, de Andrew Carnegie, tr. de W. W. Padfield kaj H. Maresquelle, 0 fr. 50; *Estonta Milito*, 1 fr. 50. — *Du Slavaj rakontoj*, 60 c. ĉe «Lingvo Internacia».

*Esperanta universala Biblioteko*: 3 novaj verketoj de nia kunlaboranto Georgo Davidov: *La Jukagiroj*, teruraj rakontoj pri malaperanta gento. Mi tremas ankoraŭ pensante al ili; *Persaj Skizoj*; *Ĉerkesaj Rakontoj*: la Ĉiopotenca Beleco. Eble oni povos riproĉi al tiuj broŝuroj pro troa malamplekso, sed ili estas interesaj kaj liveras al ni sciigojn pri popoloj aŭ literaturoj tre malmulte konataj. Ĉiu 30 hel. ĉe «La Verda Standardo». — Ali Baba kaj la kvardek Rabistoj, bonega traduko laŭ la tutmonda konata rakonto el la «mil kaj unu noktoj», de Major-General G. Cox. Sen prezo ĉe «The British Esperantist».

**Propagando kaj Industrio.** — Compendio di Gramatica Esperanto, de Paolo Lusana (Italujo). — Die Weltsprache Esperanto, de Fritz Stephan, 10 pf., Verlag von C. W. B. Naumburg, Leipzig. — Primele Lectiuni de Esperanto, laŭ Th. Cart (rumana eldono), de D<sup>ro</sup> G. Robin. — The problem of international Speech, de Anna Monsch Roberto, el The popular Science Monthly. — Esperantista dokumentaro: Tria universala Kongreso de Esperanto. Plena raporto, kiun devas havi ĉiu Esperantisto. 1,50 ĉe Esperantista Centra Oficejo. La sama eldonejo publikigas «La Presse et les Congrès universels d'Esperanto»; kolekto da ĉefaj artikoloj franc-kaj anglalingvaj artikoloj, 1 fr. 25. Ni konsilas ke oni petu la folion-katalogon de la verkoj jam eldonitaj de I. C. O., 51 rue de Clichy, Paris. — Le Malais ou l'Esperanto, 20 c. ĉe la grupo de Cochinchine, 16 rue Lagrandière, Saïgon. — Grand dictionnaire Français-Esperanto, 7<sup>a</sup> kajero, ĉe Presa Esperantista Societo.

*Lettres commerciales pratiques en Esperanto*, kun la kontraŭa franca traduko. Bonega kolekto da komercaj leteroj pri ĉiuspecaj temoj, tre rekomendinda. Estos tre utila por praktika propagando al la komercaj firmoj, 0 fr. 95 ĉe Hachette k. Kio, 79 Bd St Germain.

*Tutmonda Anekdotaro*, nova propagandilo de nia fervora amiko Ĉefeĉ. Ĝi estas elekto el mallongaj spritaj rakontoj uzablaj «por unue veki la intereson por nia lingvo kaj poste por daŭre kateni la junan lernanton al nia afero», diras en la antaŭparolo la verkinto. Ni opinias kiel tiu lerta propagandisto kaj instruanto, al kies sagaceco ni jam ŝuldas la «Ŝlosilaron» kaj la «Tutaron», 10 Spesdekoj ĉe Internacia Propagandejo Esperantista, Merton Abbey, London S. W.

**Muziko.** — *Nacia Meksika Himno*, esperantigita de Ramon Limones, muziko de Jaimes Nunó.


*La du Muloj*, el La Fontaine, traduko de Vaillant. — *En sonĝo*, el Heine, traduko de L. Zamenhof. La Muziko estas de nia konata muzikverkistino Sino José Guivy, (1,60 fr.) ĉe Presa Esperantista Societo.

**De nun, pro la multeco de la esperantaj, ni nepre citos nur la ESPERANTAĴN verkojn, kies du numerojn ni ricevos, kaj analizos nur la plej gravajn.**

«Pola Esperantisto» jam dufoje aperis, kaj jam prenis bonan lokon en nia gazetaro. Ni dissendas hodiaŭ abonilon por tiu gazeto, kaj transsendos plezure la abonojn, kiujn oni ne volus senpere mendi. (Oni aldonu la abonpagon).

Jam du grupoj, Bordeaux kaj Valenciennes, mendis unu dek, alia dekdu ekzemplerojn de «Duonsurda», intencant-ludi dum esperantaj festoj tiun ĉarman komedion. Ni antaŭe vidas grandan plezuron por la aŭdantaro.

STELETO.



## La “tago de la mortintoj”

Originala Novelo de HEDVIG THIELKING, el Berlin' (Germanujo).



*Aĉetu, kara Sinjorino, dekuon da rozoj.*

Estis malvarmega novembra posttagmezo; la malfortaj sunradioj, kiuj ankoraŭ antaŭ kelkaj horoj donis al la mondo ian afablan mienon, estis vualitaj per la nuboj, kiuj kovras la tutan urbon. Ĝusta aspekto por la «tago de la mortintoj»: Ĉio griza en grizo. Seriozece kaj silenteme rapidegis la geurbanoj al la tombejo, pripensante la hodiaŭan tagon, dediĉatan al la mortintoj.

La brua plena kaj senripoza vivo en la urbo ĉesis, la magazenoj estis fermitaj, nur la florvendistoj havis sian «rikolton», iliaj vendejoj restos malfermitaj ĝis la malfrua vespero. Pli kaj pli malpleniĝas iliaj magazenoj, kiuj estis provizataj hodiaŭ matene, per amaso da floroj.

Antaŭ la pordego de l' tombejo sin lokis la «flugantaj gefloristoj» havantaj siajn vendadojn sub libera ĉielo. Per frostremanta voĉo ili prezentis al la pasantoj la girlandojn kaj aliajn florojn, por ornamati la tombojn. Dekkvin pfenigojn la dekuo da rozoj! aĉetu! aĉetu! sinjorinoj, aĉetu do! amata sinjoro. Tiamaniere vokis maljunega ĝardenistino, malbele vestita, interfrapante siajn piedojn, por varmigi siajn membrojn rigidigitajn pro la granda malvarmo.

La unue alvokatina, gracia brunulino, dudekkvinjara ĉirkaŭe, kun grandaj, helaj kaj animplenaj okuloj, ombritaj per longaj malhelaj okulharoj, kaj bonformita vizaĝo nobela, turnis sin al la frostremanta vokantino. Aĉetu do! kara sinjorino, dekuon da rozoj, denove petis la vendistino: hodiaŭ mi vendis ankoraŭ nenion, kaj estas nun tiel malvarmege! — «Donu al mi rozojn, sed se eble nur blankajn, diris la elegantulino». Tre volonte, sinjorino, tre volonte. Tiam la vendistino prezentis al ŝi bukedon. Mi dankegas multfoje, sinjorino, la amata Dio benu vin, — mallaŭte diris la maljunulino. Ŝi rigardadis la moneron ricevitan de Margot, la juna sinjorino, poste iom kraĉis sur la moneron, kaj diris: «Manmono».

Margot Keller kun sia bukedo en la mano, rapide paŝis al la tombejo. Ŝi pripensis la malriĉan virinon, kiu devas stari la tutan tagon en la malvarmo kaj nebulo, nur vestita maldike, kaj kovrita per disŝirita tukoj sur la ŝultroj. Ho! kiel danĝere estas ja frostiĝi. Ŝi mem havas dikajn mantelon, varman pelton kaj mufon, sed malgraŭ tio ŝi ankoraŭ frostiĝas. Tiel pripensante Margot atingis sian celon, la tombon de sia patro. Ha! paĉjo, vi fartas plej bone, vi ne sentas plu la froston kaj la malsaton, diris ŝi plorante kaj mallaŭte, vidante laŭlonge la longan tombejan aleon. Jen tiu ĉi malalta monteto, kiu enhavas ŝian feliĉegon, kiun ankoraŭ ŝi posedis antaŭ kelke da monatoj, kaj kiu nun estas enterigita tie ĉi, en la tombon. Margot Keller ĉirkaŭprenis la marmorkrucon ĉirkaŭvestitan per hedero, kiu estis staranta sur la tombo de ŝia patro, kaj ŝi ekploris denove, treege. Ho! patro, tre amegata, patro kara! ekkriis ŝi, kial vi lasis sola vian kompatindan Margot en la granda mondo malĝoja.

Nun mi havas nek paĉjon nek panjon, nenion kiu prizorgos pri mi; kaj ĉiam fluas ŝiaj larmoj malsupren sur ŝiaj vangoj. Tiam la Margotaj larmoj haltis. Ŝi lokis la aĉetitajn florojn sur la tombon, kaj envolvis en tukon la enplantitajn kreskaĵojn, por ŝirmi ilin kontraŭ frostado.

Jus ŝi estis preta je sia laboro, kiam ŝi aŭdis voĉon similan al ĝemo; kaj rigardinte tien, de kie venas la aŭdata sono, Margot ekvidis ne malproksime junan virinon, tre elegante vestitan, kiu kovris sian vizaĝon per ambaŭ manoj kaj ploregis. Profunda kunsento ekkaptis ŝin. La malfeliĉegulo! Li ŝajnas suferi simile kiel mi, eble li priploras siajn gepatrojn. Sed ne, Margot jus aŭdas lian elvokon: «Ell! Ell! kial vi mortis tiel frue, tiel juna, vi, mia feliĉaĵo, mia edzinjo? kaj denove li ekploris; kaj la

korpo de la juna viro tremis, pro doloro. Ankaŭ Margot' kortuŝis tiu ĉi plorado de la junulo, tiamaniere ke ŝiaj okuloj malsekiĝis. Ho! kia malfeliĉegaĵo! ja li perdis sian junan edzinon. Kiel multe li amis ŝin, ĉar li ploregas tiel dolore kaj infane. Eble li estis edziĝinta nur antaŭ unu jaro aŭ eble nur kelke da monatoj, kiam la malkompatema morto venis, kaj ekkaptis lian amatan edzinon el liaj brakoj. Terura! terura! Sen kompato pro la dolorego de juna edzo. Ho! Margot komprenis la suferadon, perdi estajon karan, kiun oni amas per kvazaŭflama pasio, ĝin perdi sen espero pri iama revido.

Estis ne longe, de kiam ŝi estis forlasita de sia paĉjo, kaj pli frue Margot devis foriri de sia amata Kurt, kies amo igis ŝin la plej feliĉega virino en la tuta mondo. Margot ĵus fortikigis la lastan rozon aĉetitan, al la flanko de la tombo; tiam ŝi sidiĝis sur benkon starantan apud ŝi, pensante pri sia estonteco. Jes, estis feliĉaj horoj, travivitaj kun Kurt Wallberg, kunludanto de ŝia infaneco; ŝi vidis spirite la tempon de ilia ambaŭna juneco, kiel ŝi ĝojis tiam, kiam la najbaro Kurt alvenis al ŝi en la ĝardenon, por ludi kune aŭ por promenadi en la proksima arbarego, tie serĉante fragojn aŭ framb-ojn, por kune ilin manĝi infanomaniere.

Kiam mallumiĝis en la arbarego, ĉar ambaŭ timis la noktajn fantomojn kaj feinojn, por forgesi siajn timojn, ili kune ludis « kavaliro kaj principino ». Margot tiam estis la principino, ŝajne perdinta sian vojon, kaj Kurt, estante nun ŝia kavaliro, devis savi ŝin el tiu ĉi embaraso. Kurt do estis bravega kavaliro ne konanta ian ajn timon, li savis Margot per siaj fortaj manoj, kaj portis ŝin al ŝia patro. Tiu ĉi lasta nun pro tio, devis igi Kurt'on principo, kaj samtempe devis doni al li sian propran filinon Margot, kiel edzinon, ĉar tiamaniere la fabeloj rakontas.

Sed la tempo forflugis: la knabo iĝis junulo, kaj ankaŭ Margot fariĝis junulino belega. La ludadoj malaperis, kaj alvenis serioza laborado. Kurt iris al la universitato en la ĉefurbo, sed Margot restis ĉe siaj gepatroj en la malgranda urbo provinca. Bedaŭrinde baldaŭ mortis la patrino, kaj la maljuna regimentestro Keller transloĝiĝis en la ĉefurbon, kie nun Margot mastrumas diligente en la malgranda loĝejo de sia patro. Tre ofte ŝi estis trovinta la okazon por edziniĝi, sed ĉiuj amantuloj estis rifuzitaj de ŝi, ĉar Margot ne volis forlasi sian patron je liaj maljunaj tagoj, kaj aliflanke ankoraŭ ne estis alveninta la dezirato.

Ian tagon Margot estis vizitata de Kurt Wallberg, kaj tiu ĉi estis la elektitulo. Ambaŭ junaj gefraŭloj sin amikece salutis reciproke, kaj ankaŭ la Margota patro tre ĝojis pro tiu revido kun la honesta junulo.


La asesoro Wallberg ofte reigis sian vizitadon ĉe la familio Keller, kaj post multobla revido, li petis pri la mano de Margot por igi ŝin sia edzino. Margot tre volonte donis sian manon, ĉar ŝi amis kaj amas lin de la tempo de la reciproka revido. Ankaŭ la maljuna sinjoro Keller benis ambaŭ junajn geamantojn, kaj deziris por siaj nunaj du infanoj bonegan estontecon.

Nun komenciĝis nepriparolebla tempo plej feliĉega por ambaŭ gejunuloj kaj la regimentestro ĝuegis la feliĉon radiantan de siaj infanoj. Sed

bedaŭrinde tiu ĉi feliĉego ne estis longedaŭra. Kurt Wallberg devis foriri Heidelberg'on por plenumi sian oficon. Kaj kiel okazas ofte: aliaj urboj, aliaj knabinoj.

En Heidelberg oni konigis al Kurt la filinon de tiea riĉega kuracisto; tuj lin ekkaptis flama amo por tiu ĉi belulino, kaj ankaŭ li estis amata de ŝi, ĉar ŝi ne sciis, ke Kurt jam estas fianĉigita je alia knabino. La patro de la Heidelberga junulino, ankaŭ nesciante la estintecon de Kurt, permesis la duan fianĉigon je sia filino. Nun Kurt Wallberg do estas devigata sciigi al Margot Keller sian faradon, kaj peti de ŝi liberigon de sia promeso; li do skribis: « ĉar mi de nun jam rimarkas, ke mi vere amas Elli'n, kaj ke mia amo al vi estas nur la rezultato de nia infanamikeco, mi ne kredas, ke ni ambaŭ iĝus feliĉegaj, se vi postulus mian edziĝon je vi. Pro tio estus pli bone, liberigi min de mia promeso. » Tiu ĉi bato estis tro peza por la juna Margot. Sed ŝi penis venki tiun malfeliĉadon. Ŝia patro kondamnis Kurt'on kaj lin nomis la « Perfida fiĥomo ». Sed Margot defendis ĉiam ankoraŭ sian amaton, kontraŭ la insultadoj de la patro; ŝi metis la ringeton donacitan de Kurt en la tirkeston de sia trezoro, por rememorigi al li. Post kelkaj tagoj Margot skribis letereton al Kurt Wallberg, en Heidelberg, enhavantan nur la jenajn vortojn: « Margot pardonas, sed ŝia koro sangadas pro tiu bato; estu ĉiam feliĉega.... »

La vivo de Margot estis detruita, ĝia gajeco forigita; tiamaniere ŝi travivis du longajn jarojn, tiam ŝin trafis nova malfeliĉego: Ŝi perdis sian patron. Ŝi do staris sola en la mondo, sen iaj parencoj, por elporti kune kun ŝi ŝian malfeliĉadon. Tiel sidante ĉe la tombo de sia patro, ŝi povis taksii la suferadon de la juna viro staranta antaŭ la alia tombo, ornamita per multe da floroj multekostaj. Denove la juna edzo ekploris, metante malgrandan girlandon sur la monteton kaj diris: « Tiuj ĉi floroj



Mario rekonis Kurt Wallberg...

estas sendataj de nia infano, de nia Walter. Vi, mia amata edzino, ho! se vi povus reveni al via knabo, kaj povus aŭdi lian vokadon: « Dolĉega panjo, venu do al via fiĉjo ». Ha! Elli, kiel fartos nia knabo, se li nun ne havas patrinojn? »

Margot atente rigardis la junan viron, kies vizaĝo havas ja konatan mienon, ŝi rekonis Kurt Wallberg, kaj nun ankaŭ Kurt, — ĉar estis li, — ekvidis, kaj rimarkis sian amatinon; li ekalproksimiĝis al Margot, kaj ŝian manon prenante, li kriis tremante: « Pardonu al mi tion, kion mi faris al vi. Ne kondamnu min tie ĉi ĉe la tomboj de niaj amegatoj. » Margot tremis, nekapabla diri unu vorton. « Sidigu; do vi ne fartas bone », Kurt daŭrigis, kaj sidigis la tremantan fraŭlinon sur la apudstarantan benkon.

Momenton ambaŭ silentis; tiam ekparolis Margot per mallauta voĉo: « Mi vin de longe pardonis, mi vin neniam kondamnis, mi scias, ke vi estis feliĉega kun via edzino, kaj tio ja estis mia deziro.

— Ho! Margot, vi karulino, ĉu vi povas tuj pardoni? Vi, al kiu mi kaŭzis tian ĉagrenon. Ho! mia Dio! Margot, se vi scius kiel multe mi amis kaj amas mian mortintinon, tiam vi komprenus, ke mi forlasis vin por fianĉiĝi je belulino, jam nun, tie malsupre en la tero.

— Jes, Kurt, respondis Margot, via amo al ŝi estas vera, kaj tiel por mi estas facile, pardoni vin.

— Mi dankas, mi dankegas vin el mia tuta animo, ĉe la tombo de via patro, daŭrigis Kurt. Ho! kiom vi suferis! Vi do perdis vian lastan familianon?

— Multe, ja tre multe mi suferis, sed ĉiam ree mi trovis konsolon ĉe la tombo de mia patro.

Ĉu vi volas kuniri kun mi al la tombo de mia Elli? petis humile Kurt.

— Jes, tre volonte, rediris Margot, kaj tuj kunpaŝis ambaŭ al la monteto de la mortintino. Manon en la mano, kun li iris Margot antaŭ la tombon de tiu, kiu de ŝi forprenis la plej amatan estajon, al

kiu ŝi estis donacinta sian tutan vivon. Sed malgraŭ tio, nur bonanimaj pensoj plenigis la koron de Margot pri la enterigitino. Ŝi premis la manon de la funebranta edzo, kies okuloj denove malsekiĝis. Kurt, kiu rekte rigardis al la kruco staranta sur la tombo, diris: « Ho! plej kara kaj amata edzino, vi mortinta prizorgas ankoraŭ pri nia infano. Vi donas al li ree novan patrinojn. Akceptu koregan dankon, nobla virina koro ». Tiam Kurt ekparolis al Margot: « Ĉu vi volas ankaŭ pardoni al la mortintino? Ĉu vi povos esti la nova panjo de ŝia infano? » La fraŭlino ekrigardis al la kunulo, tiam ŝi diris per tremantaj lipoj: « Malfacilan aferon vi petas de mi, sed mi volas provi, ĉu mi estos kapabla, plenumi vian peton. Donu al mi dume vian infanon, mi estos lia nova amanta patrino, mi lin amos sammaniere, kiel lin amis lia mortinta patrino. Ĉar mi kontentiĝas je la amo de via infano ».

Kortuŝate Kurt ĉirkaŭprenis Margot'n kaj kisis ŝin dankeme dirante: « Elli, se vi vidas de la ĉielo malsupren sur la tero, benu mian novan fianĉigon ».

Ambaŭ genufleksis kune malantaŭ la tombo kaj preĝis. Tiam ili stariĝis kaj kunpaŝis al la tombo de la maljuna regimentestro por preĝi ankaŭ tie.

Margot havis la junan filon de Elli en sia domo kaj zorgis pri li, kaj la malgranda Walter lernis ami sian novan patrinojn. Unu jaron post la morto de sia edzino Elli, Kurt venigis Margot'n, kaj je la sama tago estis festata la geedziga festo de la juna paro en salono de la Wallberg'a villo.

De tiam travivis la geedzoj feliĉegan tempon, kaj ĉiujare je la « Tago de la mortintoj » ambaŭ iras al la tombejo, por ornamu la du tombojn, kaj por donaci al la maljuna florvendistino kelke da moneroj.

HEDVIG THIELKING.



## Oni mortigis Antikriston.

La ĉi suba teruriga rakonto ne estas, ho ve! frukto de elpensema imagado. Ĝi estas epizodo vera de l' nunaj rusaj okazajoj, montranta kion povas instigi fanatikismo kunigita kun nesĉio.

En la Gorki'a distrikto de Mogilev'a gubernio kuŝas vilaĝo Sisojevo. Ĝi enhavas ĉirkaŭ 35 kortojn. La domoj havas bonan aspekton. En ĉiu korto estas bruto; ĉe la kortoj oni vidas legomĝardenojn. La loĝantaro estas juna kaj forta; estas multe da infanoj; ĉiuj estas vestitaj sufiĉe pure.

50 % estas kapablaj legi kaj skribi. Inter la Sisojevanoj apartan situacion okupas Mihajl'o Kolĉevskij. Li estas 25-jara; li ne faras malfacilajn laborojn: lin iom doloras la brusto. La malgrandaj brunaj okuloj lumas funde de mallarĝaj orbitoj; la trajtoj estas regulaj kaj iom delikataj; liaj movoj estas lertaj, malrapidaj, kaj lia tuta vizaĝo montras malkoleremecon kaj enpensemecon. Lia plej amata okupado estas la legado de sanktaj libroj.

Kolĉevskij amas preĝi; li preĝas ĉiam serioze, kun larmoj. Ofte ĉe lin kunvenas la vilaĝanoj por interparoladi pri diversaj religiaj demandoj. En la kunvenoj Mihajl'o instruas timi Dion, honori la

car'on, estimi la pastrojn kaj ofte dum la interparolado, li, preĝante, genufleksas kun la kunvenintaro. La temo de interparolado plej ofte estas nuntempaj malkonstruigoj de la rusa politika vivado, la malbona rikolto, la vilaĝaj brulegoj k. c. Li ofte vizitadis romanov'an preĝejon, kuŝantan je du verstoj de Sisojev'o, kaj nenian sektan inklinon li malkaŝis. La vilaĝanoj opiniis lin aparta homo, al Dio agrabla. Li estas edzigitita. Li taŭgis por fariĝi la ĉefa aganta persono de la dramo ludita antaŭ nelonge en Sisojev'o.

La loko de la dramo estis tamen en la familio de alia vilaĝano, eks-soldato, Iemeljan'o Gorbaĉevskij, antaŭ du jaroj edzigitita kaj loĝanta kun la gepatroj. Gorbaĉevskij havis infanon dudekunumonan plej ordinaran, malgrasan kaj palan knabon, kiel kutime estas la brakinfanoj vilaĝanaj, ne ankoraŭ kreskintaj. El konfesoj de Kolĉevskij kaj Gorbaĉevskij montriĝas, ke dum la juneco ili ambaŭ sin okupadis

je sekreta malvirto, kaj konfesis unu al alia, ke ili ne estas kapablaj por edzaj devoj. Tamen Gorbaĉevskij iris al « avoj », « sorĉistoj », « murmuristoj » por akiri naskpovon. Post tio ĉi kvazaŭ de li naskiĝis filo. Kolĉevskij decidis, ke ĉi tiu infano estas deveninta nur de malpuremulo (diablo). Nu, li estis leginta ie, ke Antikristo nepre estos naskita de malpura viando, de malbona spirito. Lia tia opinio firmiĝis dank' al tiu ĉirkonstanco, ke Mario, la edzino de Iemeljan'o, eksciinte la sinturnadon de sia edzo al vilaĝaj sorĉistoj kaj magiistoj, malbenis la infanon, kiel filon de la diablo, en la naskiĝa momento, kaj pri tio ĉi Gorbaĉevskij rakontis al Mihajl'o dum amika interparolado. Tial kiam al Iemeljano estis naskiĝinta la filo, Kolĉevskij firme decidis, ke e tas necese lin ekstermi, kiel forton malpuran, kiel Antikriston. La naskita inklino al mistikismo ricevis difinitan formon kaj celon.

Dum la nokto de la 16<sup>a</sup> al la 17<sup>a</sup> de Julio, ĉirkaŭ la deka horo, Mihajl'o Kolĉevskij invitis la vilaĝanojn por tre grava interkonsiliĝo. Inter la invititoj estis du ekspreĝejestroj, homoj « armitaj per konfido popola »; du partoprenintoj de la rusa-japana militado. Ĉeestis ankaŭ partopreninto de la militado en 1878, scianta legi kaj skribi, konsiderinda maljunulo. Oni kuniris la domon.

Mihajl'o per mallauĉa, serioza voĉo ordonis al sia familio alporti la kandelojn de la antaŭpaska semajno — la restojn de la Granda ĵaŭdo, petis ke ĉiuj preĝu kun li, kaj mem komencis legi preĝojn. Neniu miris, ĉar tio ĉi estis kutima afero en la domo de Mihajl'o.

— « Preĝu, preĝu varme, fervore, diris Mihajl'o kelke da fojoj al kolegoj starantaj post li. Lia penetranta voĉo, la kutima asocio de ĉio dieca, pura, sankta kun lia personeco, komencis elvoki la preĝan inklinton. La ekbruligitaj kandeloj, laŭtaj kantadoj de virinoj — la edzino de Mihajl'o, lia patrino kaj tri bofilinoj, — furiozaj salutoj de Kolĉevskij brulanta pro preĝa entuziasmo, la mistika trankvileco de l' nigra nokto, per timiga, sed dolĉa hipnoto ensorĉadis la strangan aron da preĝantoj premitaj de la konscio de sia pekeco.

— « Jen nian Imperiestron turmentas diversaj malordoj », predikadis Mihajl'o, » kaj en la priskribo de la vivado de S<sup>ka</sup> Eŭstaho'o sin trovas versetoj, en kiuj oni parolas pri Antikristo... Do ĉiuj diversaj malordoj estas kaŭzigitaj de li ».

La aŭdantaro silentiĝis. Ili, kiel ili mem poste rakontadis, ekterursentis pro la vortoj de Mihajl'o, timis interrigardi unu la alian, rigardis flanken, pensis, kie do estas Antikristo.

— « Do kio nun estos? » nedecideme iu demandis.

— « Estas necese lin ekstermi » respondis Kolĉevskij.

— « Decas diri al pastro » iu rimarkis.

— « Ne, ne, ne estas bezone, ni mem kun la helpo de Dio kaj per la preĝo detruos lin, kontraŭdiris Mihajl'o, kaj tiam Ruslando fariĝos trankvila. Ĉiel-sinjoro montris al mi, ke la forto malpura ĉe ni en la vilaĝo sin kaŝis... kaj jam de pli ol unu kaj duono jaro premas nian landon. Sinjoro malkovris al mi... »

Timegigitaj, murmurantaj preĝojn, ili kun ekbruligitaj kandeloj, kun sanktfigurajoj kaj Evangelio sur la brakoj kaj brusto, kiel ĉe la religiaj procesioj, profunde seriozaj, sin turnas al la elirejo.

Mihajl'o, antaŭpaŝante al la pordo, mallauĉe, nerve demandas Iemeljan'on:

— « Ĉu vi konscias vian pekon? »

— « Pardonu min, kaj preĝu Dion por mi », respondis Gorbaĉevskij. Mihajl'o eliris el la domo kun la vortoj: « Sinjoro Dio aperis al ni, estu benita, kiu venas je la Nomo de Sinjoro. Iru kun mi, maldormu fratroj, kun mi! ».

La stranga procesio eliris el la domo. En la nokto-meza kvieto kaj malhelo tremadis la brulantaj kandeloj. 22 viroj kaj 5 virinoj, furioze farante signojn de kruco, iris por serĉi la malpuran forton, por ĝin detru, por savi la religion, la Caron kaj la patrujon. La domo de Iemeljan'o staras apud tiu de Mihajl'o. Alproksimiĝinte al ĝi, la profeto ekmurmuris:

— « Tie ĉi estas la malamiko de homa gento, tie ĉi estas Antikristo. Iemeljan'o, malfermu la pordegon! »

Al trabo inter la forno kaj la antaŭa muro, sur kvar ŝnuroj estis pendigita « lulilo ». En la lulilo kuŝis malgrasa, pala infano, la filo de Gorbaĉevskij. Li dormis.

— « Sinjoro Dio, montru al ni vian malamikon, montru Antikriston, kaj donu lin al mi, por ke mi plenumu vian volon ».

Kolĉevskij senbrue genufleksis.

Senkonscia, la amaso sin ĵetis post sia sanktulo sur la plankon.

— « Tie ĉi estas Antikristo, fratroj! Tiu ĉi infano portas lin en sia spirito; en li vivas nia kontraŭulo. Iemeljan'o, memoru, ke Abrahamo malŝatis sian solan filon, Isaakon. Iemeljan'o, mi ordonas al vi en la nomo de Dio viva, preni el la lulilo la malbenitan infanon kaj transdoni lin al lia patrino. »

Gorbaĉevskij donis sian filon al sia edzino.

— « Vi, virino, kiu per faro de la diablo naskis satanon, por pereigi la homan genton, iru kaj montru al ni la lokon, la saman, kie vi lin naskis... por ke ni lin detruu sur la loko de l' eliro. »

La patrino de l' infano volis kontraŭstarigi al la enirintoj: « Do, kion vi faras! », — sed Iemeljan'o haltigis ŝin kun la vortoj: « Ni ne scias tion, kio estas en ĉi tiu infano, estas necese savi lian animon. » Mario instigita kaj kuraĝigita de sia edzo, portis la infanon en malnovan domon, apude starantan. La procesio eniris post ŝi en duondisfalintan domon, kiu odoris je ŝafoj, musoj kaj putraĵoj de la malnovaj muroj kaj tegmento.

— « Sklavino, naskinta ĉi tiun satanon, montru en ĉi tiu ĉambro la saman lokon, kie vi naskis la malamatulon. »

— « Tie ĉi » — kaj la patrino montris la plankon ĉe la dekstra angulo de la forno.

— « Preĝu, fratroj, por ke Sinjoro donu al ni forton, venki la malamikon, legu « Reviviĝu Dio ».

En la domo aŭdiĝis varma larmema preĝo petanta benan helpon. La infano dormis.

— « Metu lin, virino, sur la lokon de la naskiĝo ».

La patrino kuŝigis lin dorse.

— « Ne, ne, metu lin malsuprenvizaĝe, por ke li ne ekvidu la tutan militistaron kristanan. »

La patrino turnis lian vizaĝon malsupren.

— « Preĝu, preĝu, furioze raŭkadis Mihajl'o, — pli, pli fervore. Ho, Sinjoro, helpu, helpu al mi, via Sklavo! »

Ĉiuj terure ekrigidiĝis.

La kapableco de memvolaj movadoj atrofiĝis. La « sanktulo » kun brulanta kandelo en unu mano kaj sanktfiguraĵo en la alia, starante apud la forno,

suprenlevis la okulojn kaj... per ambaŭ piedoj surstariĝis la infanan dorson. « Sur la aspidon kaj vasiliskon mi surpaŝis, kaj venkegis leonon kaj serpenton », — diris li.

La amaso malkvietiĝis, la virinoj ekploregis. La « sanktulo » depaŝis, kaj tute kurbiĝante denove eksursaltis. « Helpu, fratoj, al mi per viaj preĝoj. » Eksonis malforta infana ploro.

La profeto trian fojon sursaltis lin, kaj staris tiamaniere ĉirkaŭ kvin minutoj. La infano mortis. Mihajl'o kaptis lin je la piedeto, lin levis kun rava krio: « Gloron al vi, kiu montris al ni la lumon, gloron al vi! Ni venkis, ni venkis! »

Mario de teruro kvazaŭ ŝtoniĝis, ekkaptis la lulilon: ŝi ekvidis grandan sangadon. Kelkaj eksaltis el la domo: « Prenu, fratoj, ĉi tiun diablon, ni disŝiru lin kaj disjetu liajn partojn. Iemeljan'o, prenu! Tiu aliru, kiu estas pli forta! » La patro prenis la infanon je la ŝultroj sub la brakoj, kaj la profeto — je la piedoj, kaj ili komencis ŝiradi kaj tiri. « Preĝu, preĝu.... forta estas la malamiko, ni ne povas lin venki. » La ĉeestantoj forte ploregis. La piedeto de l' infano restis en la manoj de Mihajl'o. « Alportu la hakilon, alportu pli rapide, donu do la hakilon, necese estas rapidi ĝis la tagiĝo ». La sanktulo eksvingis la hakilon, kaj distranĉis la infanon duone, laŭlonge, kaj la kapon kruĉmaniere. « Gloron al vi, Sinjoro »... — « Sinjoro, montru al ni la lokon, kien lin enterigi! » Kolĉevskij prenis pecon da griza malpura tolo kaj rapide komencis enmeti en ĝin la infanajn partojn. « Ni venkis la malamikon, ĝoju, fratoj, ni estas savitaj... jam ne ekzistas la malpurulo.

Venigu nun al la pordo la ĉevalon, estas necese elveturigi la malpurajojn. » Mihajl'o alligis al la vosto de la ĉevalo sian portajojn. La profeto mem sidigis sur la ĉevalon kaj ordonis, ke la apudestantoj lin sekvu. Ili eliris kun kandeloj kaj sanktfigurajoj. « Turnu vin al la domo, kie estis la malpurulo, kaj kraĉu trifoje! » La ensorĉitaj kunbatalantoj sin turnis kaj kraĉis trifoje. « Sinjoro, montru al ni la lokon, por lin enterigi. » La ĉevalo iris laŭlonge de la strato al la marĉo, kaj haltis apud kanalo kun akvo de antaŭ nelonga pluvo. « Tie ĉi sinjoro montras la lokon por lin jeti. » Ili malligis la saketon de la vosto, kaj jetis ĝin en la kanalon.

— « Kraĉu trifoje! » Oni blovis kaj kraĉis: « Ni

reiru domen, kiel sorĉistoj de la Irodo. » Ili eniris la domon, kie estis farita la mortigo.

— « Alportu al mi akvon. » Oni alportis siltelon. — « Kiel ĉe la sankta vespermanĝo Sinjoro lavis la manojn kaj piedojn de siaj lernantoj, tiel mi ankaŭ devas vin lavi; demetu la ŝuojn! » Li lavis al ili la piedojn kaj manojn, kaj viŝis ilin per la basko de kiteo. Ĉion li faris pie preĝante. Ĉiuj salutante Mihajl'on kliniĝis ĝis la piedoj. — « Pardonu nin, preĝu por ni! » Kolĉevskij prenis folieton kun portreto de pastro Johano el Kronŝtato. Li mem ĝin kisis, kaj ĝin donis al aliaj por kisi.

Leviĝis la suno, ekbrilis la unua lumo kaj la teruro ekregis la enpeusemajn kapojn. « Kion ni estas farintaj? »... Lacigitaj ili kun larmoj disiris hejmen. La virinoj sin jetis sur ilin riproĉante.

En la vilaĝo eklaŭtiĝis krioj. Kunkurante amase, ĉiuj paroladis samtempe, penis unu al la alia rakonti kiel eble plej da detaloj. Kuntiriĝis la vizaĝoj de la partoprenintoj de la heroo taro. La patro de l' infano iris al urjadnik (policisto) por ĉion rakonti; li por tio ĉi ankaŭ iris Romanov'o'n al la pastro. La lasta ne kredis al li, opiniis lin malsobra, kaj veturis alian vilaĝon je siaj aferoj.

Alveturis administrataro, komenciĝis juĝesplorado: oni kolektis en la ĉeesto de l' arestitoj la restaĵojn de l' infano. La dua Romanov'a pastro rakontis, ke oni enterigis la infanon tre solene.... La vilaĝanaro ploregis...

Oni arestis 21 virojn kaj 7 virinojn. Ni renkontis la Sisojevan'ojn sur la vojo al Dubrovni, kie ili estis por la juĝesplorado, al Gorki, kien oni kondukis ilin por ilin enŝlosi en malliberejon. Neniu el ili faris impreson de krimulo: ĉiuj estis ordinaraj, pacemaj vilaĝanoj; ili mem estis partoprenintaj la okazintaĵon senkonscie, ne sciante, kiel kaj kial. Oni rakontas, ke virino aliris al poliestro, kiam li en Sisojev'o enskribadis la vizaĝanojn, kaj petis, ke ŝian nomon ankaŭ li enskribu.

— « Do vi mortigis? » — demandis la poliestro. — « Ne, paĉjo, mi ne mortigis, sed mi nur tie ĉi staris kun kandeletoj; tial por mi ankaŭ devas esti la rekompenco de estraro por mortigo de Antikristo! »

Pastro J. N. KITAREF,

Esperantigis D<sup>ro</sup> J. ABRAMSON.

## HISTORIO SEN PAROLOJ : LA BANO DE L' GRAFO.

Lia grafa moŝto, en sia urbo arbitraciulo de elegantecoj, estas bonhumora ili hodiaŭ surmetis belegan novan tutveston kvadrata striitan kaj ĉapelon « Girondin » (1). Pasante kontraŭ la Naĝlernejo: « Bone, li diras al si, tien ĉi eniru, la tiea vidaĵo estas amuza, se nombra estas la naĝantaro ». — Dika sinjoro ĵus mirigas la kunnaĝantojn per lertajtoj; helpate de sia dikkorpeco, li facile flosas kvazaŭ tabulo, aŭ tenante la brakojn ekster la akvo, viva pruvo de l' Arhimeda principo. Lia grafa moŝto lin rigardas de l' supro de tabulego, kiu, meze de l' banejo, utilas por subakviĝi, kaj ŝercadas kun konatuloj:

### II.

— « Ĉu bona estas la akvo, kamarad? » — « Sufiĉe bona, iom malvarmeta... Ĉu vi tuj ne banos vin? » — « Ne hodiaŭ, mi prefero fumos bonan cigaron ». — « Unu ne malhelpas la alian.... ho! la mian senatente mi ĵus estingis... » — « Reekbruligu ĝin; tio vin revarmigos ». — « Pardonu; mi ne havas, kompreneble, alumetojn en la poŝoj! » — « Atendu: mi tuj donos al vi fajron ».

Poste lia grafa moŝto, ĝentile kliniĝinte, prezentas sian cigaron al la amiko, kiu pendigas sin je l' tabulo, por ekkapti fajron...

### III.

Tuj kiam la afero sukcesis: Dankon, grafo, mi reĉiras mian banon; sed, per Dio, kien do vi iras? Vi jam nin lasas! » La grafa moŝto kun kvar hufoj al la ĉielo, forjetita de la tabulo, kiu la amiko subite forlasis, kaj kiu reprenis la unuan staton, iom vibrante same kiel la sago de l' malfidema militisto en la ventro de l' Trojana Ĉevalo.

Kompreneble lia grafa moŝto ne povas daŭre resti en la akro; la Newton'a principo lin refaligas en la profundon de l' akvo, postela dirita Arhimeda principo lin revenigas al la supro, tute malvarmigita per tiu neatendita bano, kiu instigos lin fari utilajn pensojn pri la danĝereco de fumado tro proksima je l' akvo.

ERNEST BACQUET (2a Premio).

(1) Vidu la noton de l' paĝo 62a.



C Oxenford

## La punktoj, de M. B. M.

Ĉe epoko dum kiu la punkto ludas tiel grandan rolon en niaj modoj, estas interese, mi kredas, samideaninoj, koni la devenon de tiu facilrompa teksaĵo, kiu riĉigas kaj luksigas niajn kostumojn. Malfeliĉe, ĝia naŝkiĝo estas por ni mistero, ĉar ĝia tradicio ne venas ĝis ni. Ĉe la XIII<sup>a</sup> jarcento, ĝi ne estas ankoraŭ citita.

Unue oni brodis sur la tolo, kanvaso, retaĵoj nomataj « lacis », bendojn sen dentumajoj; nur pli poste oni konturtrancis ilin. Tiam aperis la punkto je ŝpinilo, kiun per siaj blankaj manoj evoluciigis la altranĝulinioj, kaj nur de la XIV<sup>a</sup> jarcento oni komencas trovi tekstojn rilatajn al la punkto.

En 1390, la punkto estas citata en la traktato interkonsentita de la urbo Bruĝo kaj Anglujo. Oni scias ankaŭ, ke en 1476 Charles le Téméraire (Karolo la tro bravega), perdis siajn punktojn ĉe la batalo de Granson. La muzeo de Cluny posedas kufon el brodita tolo, kiu, laŭdire, apartenis al Charles Quint (Karolo V). Ĉe la katedro en Praha estas albo brodita de Anne de Bohême. (1527).

Al Katerino de Medicino oni ŝuldis ŝategon al la punkto, dank' al la modo de l' krispoj. Pri tiuj famaj kolumoj oni rakontas, ke, ian tagon, kiam Sr<sup>o</sup> de Fresnes Forges estis ĉe reĝino Margerito, li montris al ŝia Moŝto sian miron vidi virinojn portantajn tiel grandajn krispojn, kaj ŝajnis dubi, ke ili povas manĝi sup<sup>o</sup>n ne malpurigante tiun ornamilon. Margerito alportigis kuleron kun longa tenilo kaj kaĉon; poste ŝi ĝin manĝis ne makulante sin kaj diris ridetante: « Vi vidas, Sinjoro de Fresnes, ke kun inteligenteco, ĉio estas aranĝebla ». Por ornamo tiujn krispojn, necesa estis senmezura amplekso, kiu necesigis multe da punkto.

Dum Henriko IV<sup>a</sup> kaj Ludoviko XIII<sup>a</sup> oni plu ne portas tiujn tro multe vastajn krispojn. Eĉ tiu ĉi lasta estis pli severa: li tute forigis ilin; viroj kaj virinoj estis devigataj forlasi la punktojn por la monaĥa tolo. Oni diras, ke kiam mortis Cinq-Mars, (\*) (1642), li posedis pli ol tri cent ornamilojn: kolumojn kaj manumojn el belegaj punktoj. Anne d'Autriche (Aŭstrujo) havis mirindajn punktojn, kaj oni citas malsupraĵon de juvo el Venezia punkto tute broditan per multekostaj ŝtonetoj fiksitaj en la tulon.

Tiam alvenis la luksa reĝado de Ludoviko XIV<sup>a</sup>, kiu donis gravan lokon al la punkto. Mazarin tamen turmentis tiun modon, kaj, en 1660, edikto (\*\*) malpermesis la punktojn. Tiu edikto eliris ĉe l' momento de l' edziĝo de la juna reĝo kun reĝidino Marie-Thérèse. Oni konscias la ribelon, kiun ĝi kaŭzis en tiu cirkonstanco, ĉe kiu ĉiu volis sin montri kun la tuta belegeco, kiun permesis tia okazaĵo. Tiu persekuto kvietigis, nur kiam la reĝo estis sufiĉe jardiĉa por scii ŝati la belajaĵojn, kaj estis plene favora al la punktoj.

Colbert uzis tiun okazon por starigi manfabrikejojn. Li

sendis Venezion kelkajn laboristinojn jam sciantajn la punkarton, por ke ili ellernu la fabrikadon de la Veneziaj punktoj.

Alençon, Le Quesnoy, Reims, Sedan, Arras, Aurillac fabrikis punkton, kiun oni nomis francaj punktoj; sed la Venezia respubliko maltrankviligis pro la forveturo de siaj laboristinoj venigitaj de Francujo, por ke tie ili instruu pri sia arto. kaj tio estis juĝata kiel ŝtatkrimo, pro kiu oni meritis la mortpunon; sed Francujo konservis, kion ĝi estis akirinta, kaj oni faris admirindaĵojn.

Tiam estis modaj la belaj punktoj iom pezaj, sed admirindaj, kiuj ornamis la virajn vestaĵojn kaj la albojn de l' prelatoj. La glora jarcento naskis mirindajn laborojn el franca kaj venezia punktoj; el tiuj pezaj punktoj, kiuj nur plate oni povis porti, ĝi faris delikatajn, flekseblajn punktojn uzebblajn por falbaloj. Multajn oni faris en Auvergne, en Aurillac kaj Le Puy: ankaŭ en Normandie kaj la unua fabrikejo estis en Le Havre. La Caux (\*\*\*)-anoj faris tiun laboron Paris havis ankaŭ sian punkton.

Nur en la XVIII<sup>a</sup> jarcento la ŝpiniloj havis ja grandegan sukceson. El tiu fabrikado naskis la punktoj el Valenciennes, Malines, Anglujo, Chantilly kaj la blonda punkto.

La Valencienne'aj havas retojn kun kvadrataj maŝoj tre regulaj. La desegno de la Maline'aj estas ĉirkaŭita de plata fadeno, kiu igas ilin malpli disŝireblaj. Ili estis modegaj dum Ludoviko XV<sup>a</sup>. Por fabriki la Chantilly'an oni uzas silkon, kies fadenoj estas multe torditaj. Ĝi estis la preferata de Sr<sup>ino</sup> de Sévigné. La blonda punkto estas tiel nomita pro la materio uzata por sia fabrikado, t. e. kruda, silko helflava. Niatempe, ĝi estas precipe blanka aŭ nigra. Ĝi estis la plej ŝatata punkto de Marie-Antoinette.

Fine ĉirkaŭ 1830 la fabrikado de la punkto per mekaniko igis acetebla por ĉiuj la punkton, kiu ĝis tiam estis aparteninta nur al la riĉuloj. Napoleono ja penis al ĝi redoni ĝian monarkan belegecon, sed estus estinte necese havi trankvilan epokon, kiun oni ne havis kun li, kaj nur post lia regado la manfabrikejoj prosperis.

La vera punkto vivas ankoraŭ; sed la finiteco de ĝia laboro ne estas tia, kiel en pasinta tempo, kaj oni tiel belete ĝin imitas, ke ĝi estas multe malpli kara.

Tamen ni vidas ankoraŭ kelkajn el tiuj malnovaj punktoj en la edziniĝaj korboj, sur la vesperaj aŭ ceremoniaj tualetoj.

Por la posttagmezoj ni pli ŝatas, kaj tio estas pli praktika, la dikajn punkton el Cluny konsistantan el bendoj ornamitaj per steloj, rozacoj, arabaj desegnaĵoj.

De kelkaj jaroj ni uzas multe da Irlanda punkto; tamen ĝi ŝajnas iom flanklasita por la retpono. nun treege moda, kaj sur kiun oni almetas broditajn florojn el tolo.

Pli ol iam al ni plaĉas por niaj korsaĵoj la punkto el Irlando, Venezia, kaj eĉ la punktoj miksitaj La Valencienne'ajn oni almetas ĉien, sur niajn robojn, korsaĵojn, tukaron, kusenojn, pinglokusenojn, k. e.

El « Le Télégramme ».

ROKSANO.

(\*) Favorito de Ludoviko XIII<sup>a</sup>.

(\*\*) Lat.: edictum; hisp.: edicto; ang.: edict; fr.: édit; it.: editto.

(\*\*\*) Parto de la Normandie: Seine-Inférieure.

# PRI ESPERANTO

## Vizito de Sinjoro Privat en Ameriko.



S<sup>ro</sup> PRIVAT.

eble dekkvin diversaj urboj kaj vilaĝoj, almenaŭ dekkvin mil personoj, kaj sukcesis varbi multajn novajn rekrutojn al la «paca batalantaro».

Inter la urboj, kie li jam parolis, estas New-York, Brooklyn, Newark, Orange, Boston, Auburndale, Roxbury, Cambridge, Providence, Philadelphia, Swarthmore, Atlantic City kaj al aj. Poste, li vizitis Washington, Chicago, kaj aliaj urboj en Usono kaj Kanado.

En New York, li faris multajn paroladojn en diversaj lokoj, lernejoj, kolegioj, kluboj, k. t. p., kaj faris ses kursojn, inter ili kompreneble, kelkajn al la ĝejnuloj. En la Irving Alta Lernejo por junulinoj li faris kurson al 125 knabinoj, pri kiu oni iom ŝercis en la ĵurnaloj, sed eĉ la ŝercoj helpas, ĉar ili kreas intereson. La grava firmo Revell baldaŭ publikigis broŝuron pri Esperanto, verkita de li, kaj li fondis kelkajn novajn grupojn.

En Bostono, la sidejo de la Amerika Esperantista Asocio, li konatiĝis kun S<sup>ro</sup> Twombly, Sekretario de la Asocio, kaj revidis kelkajn kongresajn amikojn, Profesorojn Lowell, Harvey kaj aliaj. Oni aranĝis gravajn paroladojn en la belega Publika Librejo, kaj en Harvard Universitato, ĉe Cambridge, kie li sukcesis interesigi la famekonatan psikologiiston, profesoron William James.

En Providence, dank' al la penado de juna samideano, S<sup>ro</sup> Brown, oni aranĝis bonegan kunvenon, sub la prezido de la Urbestro, antaŭ 500 personoj. Korajn gratulojn!

Dum la nuna monato Februaro, S<sup>ro</sup> Privat estas en Philadelphia. La loka societo elektis komitaton, sub la direkto de nia agema samideano, S<sup>ro</sup> Hetzell, kiu zorgas pri la aranĝoj. La unua ricevo okazis en la ĉambrego de la lernejo de Industria Arto, kie, antaŭ du jaroj, sub la direkto de nia loka pioniro, P<sup>r</sup> Grillon, naskiĝis la grupo. La kunveno bone sukcesis, kaj oni aranĝis du kursojn, postgimezan kaj vesperan, kiuj okazas trifoje ĉiusemajne en la nova Carnegie Librejo, 17<sup>a</sup> kaj Spring Garden Stratoj, dank' al la afabla permeso de la urba librejestraro. Preskaŭ cent lernantoj aliĝis, kaj lernas bone per la «senpera» metodo, kiun S<sup>ro</sup> Privat tiel lerte uzas. Tiu metodo ne estas multe konata en Usono, sed la sukceso kuraĝigis nin fondi la unuan filion de la nova Instituto por la Instruado de Esperanto, kiu instruos laŭ la nomita metodo.

Kompreneble oni ankaŭ aranĝis multajn aliajn paroladojn kaj kunvenojn. Kelkaj novaj filioj de la grupo fondiĝas, inter ili unu sub la direkto de nia malnova amiko, D<sup>ro</sup> Golden, kaj la gefratoj Brown, kies patro estis kunlernanto de nia Majstro, sub la instruado de ties patro, en Rusujo.

Nia plej fervora kaj agema kunlaboranto, S<sup>ro</sup> Nichols, kiu loĝas en Altantic City, aranĝis la viziton en tiu urbo; la 8<sup>an</sup>, 9<sup>an</sup> kaj 10<sup>an</sup>, kunvenoj okazis en la belega hotelo «Traymore» kaj la Alta Lernejo. Ili bonege sukcesis kaj certe oni fondos grupon, kaj eble kelkajn grupojn. Tio ĉi estas tre grava, ĉar Atlantic City estas la plej granda kaj la plej konata apudmara somerloĝejo en Usono, kaj oni venas tien el ĉiuj partoj de la lando. Bonega loko por propagandi, kaj renkonti samideanojn!

Multaj gazetoj kaj ĵurnaloj publikigas grandajn artikolojn kaj la movado komencas altiri al si la atenton kaj la intereson, kiun ĝi meritas. Nia movado nun kreskas rapide, kaj la vizito de S<sup>ro</sup> Privat multe helpas al ni. La propagando ĉiam pli kaj pli graviĝas kaj unuiĝas en ĉiuj partoj de la lando. S<sup>ro</sup> Privat

raportas, ke ĉie li trovis la samideanojn tre fidelajn al la Zamenhofa lingvo, kaj ke ĉie oni tre deziras ke la Kvina Kongreso okazu en Usono. Certe, la graveco de nia lando kaj la fervoreco de la Usonaj samideanoj kuraĝigas nin esperi, ke la Esperantistaro elektos nian landon, kaj faros al ni la grandan plezuron akcepti ilin en 1909.

S<sup>ro</sup> Privat reiros Eŭropon en printempo, por raportoj pri la movado ĉe ni, kaj por alporti nian inviton por la Kvina, kiun, ni esperas, la samideanoj akceptos, kiam oni formale prezentos ĝin en Dresdeno.

LEWIS B. LÜDERS.

Prezidanto de Philad. Esp. Soc.

## El diversaj landoj.

**FILIPINOJ.** — Baldaŭ malfermiĝos en Manila Esperanta Oficejo, kie oni povos trovi ĉiujn literaturaĵojn, adresarojn, sciigojn, k. a. La oficejo estos ĉe la Hotel de Francia, Escolta (strato), kies mastro, S<sup>ro</sup> Ignacio Arnalot, bonega esperantisto, prenos sur sin la oficon de konsulo. Nia bonega kunfrato «Filipina Esperantisto», el kiu ni ĉerpas la informon, iĝas ĉiunumere pli interesa. Ĝi konigas, ke baldaŭ estos fondata, en la publikaj lernejoj, priesperanta kurso egalvalora al la kursoj de latina, greka, franca, germana,.... lingvoj. Jam ekzistas nedevega kurso en la liceo de Manila. — Nia sindona amiko, D<sup>ro</sup> Yemans, veturas nun tra la mondo por viziti multajn esperantistajn centrojn: Hindujo, Madrid, Genevo, Parizo, Londono, Nov-Jorko, Boston, k. a. Li kunportas la artikolon verkita por «Tra la Mondo» de Ministro Shuster, kies bela portreto troviĝas en «F. E.» kun tiu de D<sup>ro</sup> Yemans.

**JAPANUJO.** — Multe sukcesis la 2<sup>a</sup> ĝenerala kunveno de *Japana Esperantista Asocio* la 12<sup>an</sup> de Sept. 1907. Pli ol 300 anoĵ de diversaj urboj ĉeestis. Oni aŭdis multajn paroladojn japane kaj Esperante, aŭ legadon de leteroj, inter aliaj de grafo Hajaŝi, Ministro de Fremdaj Aferoj, kaj de S<sup>roj</sup> Kenzo Ikeda kaj Kahei Otani, vicprezidantoj de «Japana eksterkomerca societo». Ne estas necese insisti pri la graveco de tiuj leteroj, tre simpatiaj por Esperanto, *nia Esperanto* eĉ skribis grafo Hajaŝi.

D<sup>ro</sup> K. Kroita, S<sup>ro</sup> Tagawa parolis pri Esperanto kaj la Granda Ekspozicio okazonta en 1912, kaj D<sup>ro</sup> Takakusu decidigis sen ia diskutado, ke oni proponu al la Kvara, ke okazu universala kongreso en Japanujo dum la Granda ticia Ekspozicio.

Ni jam komencu ŝpari por la granda vojaĝo!

**PORTUGALUJO.** «Pasigante la vintron sur tiu ĉi insulo mi iniciatis seslecionan kurson al kiu partoprenis 37 lernantoj inter kiuj Monsinjoro Homen, membro de la portugala parlamento, abato Schmitz, profesoro ĉe la seminario, kaj ankaŭ la direktoro de la Madeira poŝto.

Aliaj kurson mi komencos dum la venonta semajno (4<sup>an</sup> de Marto): pli ol 50 personoj partoprenos al ĝi.

S<sup>ro</sup> Francisco Fulgencio d'Andrade (seminario), la plej bona lerninto el la unua kurso gajnis kiel premion unu jarabonon de «Tra la Mondo»...»

«... La sola instruilo estas la portugala ŝlosilo (1); la instrua lingvo: Esperanto. Nur en la komenco mi estis devigata fari la unuajn klarigojn per la franca lingvo. Sed en la dua kurso, partoprenintoj en la unua jam povas helpi, tradukante la komencajn klarigojn portugalen...»

El leteroj de S<sup>ro</sup> Herb. H. Hoveler (Ĉefec) Funchal, Madeira.

Tiu laboro jam donis fruktojn. La loka gazeto «O Jornal» presigas artikolojn pri Esperanto; kaj grupo fondiĝis en Funchal. — Hon. Prez.: Prof. Ernesto Schmitz; Prez.: Prof. P. Manuel de Silveira; Vic. Prez.: S<sup>ro</sup> Francisco Fulgencio d'Andrade; Sekr.: S<sup>ro</sup> Manuel Vasconcellos: 26, Rua do Seminario.

Jen kiel nia amiko *ripozas!* Li ankaŭ preparis novan bonegan propagandilon, pri kiu estas parolate aliloke. Al li niajn varmajn gratulojn, kaj ankaŭ niajn korajn dankojn pro la aljuĝo de «Tra la Mondo» kiel premio. La profesoroj kaj propagandistoj uzu same nian gazeton en samaj cirkonstancoj.

(1) Substrekiĝita de ni. Tio estas nova pruvo pri la bonegeco de tiuj mirindaj ŝlosiloj, kiujn ni ne devas ĉesi dissendi.



De ĉie, cetere, ni ricevas atestaĵojn pri la senĉesa propagando. Ni citu la afiŝon de la grupo de Bordeaux, kie okazas ĉiutage kursojn en la Medicina Fakultato, Lernejoj, Domo de la socialaĵoj, kaj belan foton de nia amiko Southcombe (E. N. K.) montrantan la fasadon de la «Municipal Technical School» en Brighton kun granda afiŝo pri la Esperantaj kursoj.

Pro sufiĉego da presindaĵoj nia numero enhavas malmulte da ilustritaj paĝoj. Ni esperas, ke oni ne plendos, ĉar la ĉefa valoro de Esperanta gazeto estas ĝia legintereso.

### Teknikaj vortaroj.

La verkado de teknikaj vortaroj, entreprenita de «Internacia Scienca Oficejo» estas vere giganta laboro. Pri ĝi la lasta numero de «Internacia Scienca Revuo» enhavas interesajn sciigojn, kun klarigoj pri la labora metodo, tre bone elpensita kaj faciligota per speciale presitaj folioj paperaj.

Ĉar la helpo de ĉiuj estas necesa, por sukcese plenumi la taskon, ni atentigas niajn sindonajn kunlaborantojn pri la jena parto de la artikolo aludita:

«Aŭtoro, kiu havas iom da tempo, bonvolu mem ĉerpi el siaj verkoj la vortojn novajn aŭ teknikajn, skribi ilin tablele sur paperajn foliojn kun kiel eble plej da tradukoj naciaj, laŭ la modelo montrita ĉe fig. 6<sup>a</sup>».

La artikolo, kun la dirita fig. 6<sup>a</sup>, kaj ankaŭ la necesaj folioj, estos sendataj al la bonvolaj helpantoj. Ni sciigas plezure, ke niaj bonegaj kunlaborantoj F<sup>ino</sup> Flourens kaj L. de Guesnet, afable proponis labori laŭ la metodo ĉi supre dirita. La aliaj, kiuj bonvolos partopreni en la fruktodona laboro de «I. S. O.» sin turnu senpere al S<sup>ro</sup> R. de Saussure, la distinginda direktoro de la Oficejo, kaj redaktoro de «I. S. R.», 8, rue Bovy-Lysberg, Genève, Suisse, sciigante al li pri la titoloj de la verkoj, el kiuj ili intencas ĉerpi la teknikajn vortojn.

**Novaj gazetoj.** — Ĉilo esperantista. (Reapero) Prezo? Ĉe Prof. Ipolito K. Kontreras, Casilla 1988, Santiago-Chile. — Roma Esperantisto, 3 fr. ĉe Prof. Luigi Giambene, 198, Babuino, Roma.

**Voĉo de Kuracistoj**, senpaga aldono al la duonmonata gazeto «Glos lekarzy». Celas interrilatigi ĉiulandajn kuracistojn. La malavara entrepreno de nia Galicia kunfrato «Glos lekarzy» estas tre rekomendinda. Ĉiuj kuracistoj esperantistaj devas uzi la valoran kaj praktikan perilon liveritan al ili, kaj ĝin konigi, kiel eble plej dise. Ĉe D<sup>ro</sup> Stefan Mikolajski, Lwów, strato Sniadeckich 6, Aŭstrio — Galicio.

Oni forgesis presigi, en nia lasta numero, kelkajn liniojn pri la ĉarma grupo de Boheminoj (*Tria serio*). Tiuj ĉi fraŭlinoj estas lernantinoj ĉe knabina industria lernejo kaj ĉe knabina liceo en Ĉ. Budejovice. Meze sidas S<sup>ro</sup> Franl. K. Svaniua, nia bonega kunlaboranto, bonekonata instruisto, kiu faras ĉiu-semajnan Esperantan kurson.

STELETO.

### Korespondo.

Ĝenevo, Februaro 1908.

*Estimata Sinjoro Redaktoro,*

La artikolo, kiun vi publikigis en la Januara kajero de T. I. M. sub la titolo «Delegacio kaj Esperanto» devigas min fari la jenajn korektojn pri la punktoj, kiuj koncernas mian agadon en la nomita afero.

1<sup>e</sup> Neniam *Esperanto* entreprenis ian «agitadon por la reformoj». Mi simple penis montri, ke sekvante la vojon montritan en la antaŭparolo de la Fundamento, oni povas fari ĉiun saĝan plibonigon, nenion rompante en la necesega unueco de nia lingvo, kaj ke inter la proponoj prezentitaj de la Delegitaro, ni povas provi tiujn, kiuj estas praktikaj kaj realigeblaj sen rompo en la tradicio (1). (Ili ne estas multaj!) Mi ĝis nun ne supozis, ke paroli laŭ la senco montrita en la antaŭparolo de la Fundamento signifas entrepreni agitadon por reformoj.

2<sup>e</sup> Mi ne diskutas pri la rolo, kiun havas aŭ devas havi la

Lingva Komitato, sed mi rimarkigas tion ĉi: Se la deveno de Lingva Komitato, kiu simple «konstatas» kaj «poluras» estas ne grava, la demando tute ne estas sama, se tiu komitato sin okupas pri teoriaj lingvaj demandoj (tiun rolon oni aljuĝis al nia L. K. speciale en la lasta tempo). En tiu lasta okazo, estas absolute necese, ke la aŭtoritateco de tia komitato estu tute nekontestebla. La rolo de nia L. K. ĝis nun tute ne estis tiu, kiun plenumis la Franca Akademio; sekve, ĉia komparo pri la du institucioj estas nun neĝusta.

3<sup>e</sup> Mi neniam diris aŭ skribis, ke oni devas disigi aŭ anstataŭi la L. K., sed ja ĝuste la malon. La organizaĵo, aludita en la artikolo diskutita de vi (2), simple celis doni al la nun ekzistantaj organoj difinitan mandaton kaj precizajn kompetentecojn, neniel anstataŭi la nomitajn organojn per io nova.

4<sup>e</sup> Ŝajnas al mi, ke laŭ la lastaj paragrafoj de via artikolo, vi ne konis la cirkulerojn eldonitajn de la iniciatintoj por internacia esperantista organizaĵo, ĉar ili forigis kelkajn malkomprenigojn aŭ malĝustajn interpretojn de siaj intencoj. Mi do esperas, ke vidinte ilin, vi konstato, ke nia plano tute ne estas tiu, kiun vi aljuĝas al ni.

Akceptu, Estimata Sinjoro Redaktoro, la certigon de mia alta estimo.

H. HODLER,  
Direktoro de «*Esperanto*».

S<sup>ro</sup> H. Hodler bezonis du klarigajn cirkulerojn por forigi malkomprenigojn aŭ malĝustajn interpretojn de siaj intencoj. Tiu malnece pravigas tute tion, kion mi skribis, kion pravigas ankaŭ paragrafo de la letero de D<sup>ro</sup> Zamenhof «al ĉiuj Esperantistoj».

Trankviligis min ankaŭ la multaj aprobaĵoj leteroj ricevitaj de ĉie, el kiuj mi citos nur la jenan pro ĝia malproksima deveno kaj la aŭtoritateco de ĝia subskribinto.

A. MONTROSIER.

«Koran saluton kaj gratulojn pri la kritiko kontraŭ la stranga propono de mia amiko Hodler, kun kiu mi tute malkonsentas, ĉar li ne konas la kongresajn impresojn de Boulogne! Tutkore via,

ED. PRIVAT.

- (1) *Esperanto*, 27 nov. Artikolo «Grava momento».  
(2) *Esperanto*, 12 dec. Artikolo «La nuna necesajo».

### Korespondeto.

*Grupo de Troyes.* — Mi legis plezure pri via ŝatinda aprobo.

S<sup>ro</sup> Ernest Pointer. — Mi tute aprobas vian ideon.

S<sup>ro</sup> Pauler. — La Januara n<sup>o</sup> estis sendata la 4<sup>o</sup> de Feb. Vi povas ricevi la petitajn propagandilojn por 15 c. ĉiu (almenaŭ 5 similaj).

La *Tananariva Grupo* ne povas respondi al la tro multaj petoj pri pm. aŭ pk.

S<sup>ro</sup> T. Matuszewski. — Mi ricevis la valoron de la 2<sup>o</sup> noj petitaj por via Societo.

→ S<sup>ro</sup> F. J. Havelka, kaj kk. aliaj. — Vi ne faris la necesajn por via adresŝanĝo. Pro tio la noj senditaj al la malnova adreso perdiĝis. La kulpo estas via.

→ S<sup>roj</sup> Daumier, Potukij, k. a. — Ni ne respondis al viaj leteroj, ĉar vi ne aldonis la necesajn porrespondajn markojn aŭ respondkuponon.

Rino J. Barbero, Sroj Fl. Anstian kaj Zygmunt Romanski. — Dankon por viaj afablaj erarforigaj leter. Ni interkonsentas.

Sino Carolino Wieslander. — La afero estas ordigita.

S<sup>ro</sup> René Isamberl. — Oni forgesis sciigi, ke la ab. mend. por vi esti renov. de la grup. ab. ! De tio la eraro.

S<sup>ro</sup> Jos. Jerabek. Via ab. finiĝis decemb. Bedaŭre, pro manko de spac., est. nebl. enpres. senpag. anonc.

Ĵus aperis *Bord-Esperanto*, kanteto kun fortepiana akompanaĵo, 12 Sd. ĉe Esp.-Oficejo, Beaune (Fr.).

# Premio al niaj gelegantoj.



HISPANUJO; RUSUJO; SIBERUJO, KAŬKAZO, FINNLANDO,  
Kaj CENTRAJ PROVINCOJ; SVEDUJO; BULGARUJO; GERMAN-  
UJO, PRUSUJO; FRANCUJO; USONO; AŬSTRUJO; GERMANA,  
BOHEMUJO, MORAVUJO, HUNGARUJO

konas kaj ŝatas la bonegan

## POŝHORLOGO "L'ESPERO"

dank'al « Tra la Mondo ». Ni ĝojas pri tiu kontentiga rezultato, kiu montras la efikecon de *Esperanta Komerca Publikigado* en gazeto disvastiĝinta *Tra la Mondo*.

Por SINJOROJ : 30 fr. = 12 Sm. — Por SINJORINOJ : Ora, 90 fr. = 36 Sm.; arĝenta, 45 fr. = 18 Sm.

### Solvoj de problemoj (unua kvaronjaro).

PROBLEMO 1<sup>a</sup>. PO — LI — PO.

PROBLEMO 2<sup>a</sup>. Tial ke li estas LEKANT(ET)O.

PROBLEMO 3<sup>a</sup>. Porelo — leporo — lepro.

PROBLEMO 4<sup>a</sup>. OK uloj strangaj kaj eksterordinaraj.

PROBLEMO 5<sup>a</sup>. Limo — cimo.

PROBLEMO 6<sup>a</sup>.     d u m     S U B  
              u n u     U N U  
              m u s     B U F

PROBLEMA 7<sup>a</sup>.   M A N  
                  A L E  
                  N E P I N  
                  I D E  
                  N E C E S  
                  E D I  
                  S I D

PROBLEMO 8<sup>a</sup>. Litero E.

PROBLEMO 9<sup>a</sup>. Maro Navo Pano Lado.  
                  muro nevo pino ludo.

PROBLEMO 10<sup>a</sup>. KA — ROT' = KAROT'.

PROBLEMO 11<sup>a</sup>. KAR — AS' = KARAS'.

PROBLEMO 12<sup>a</sup>. KRAK — EN' = KRAKEN'.

PROBLEMO 13<sup>a</sup>. Prenu BI, eron de kombisto.

PROBLEMO 14<sup>a</sup>. Pavo — pato — pano.

PROBLEMO 15<sup>a</sup>. Ko — libro.

PROBLEMO 16<sup>a</sup>. Litero N aŭ Movo.

Divenis ĉiujn problemojn : Malnovulo, kiu gajnas la 1<sup>an</sup> premion.  
Divenis la 1<sup>an</sup>, 2<sup>an</sup>, 3<sup>an</sup>, 5<sup>an</sup>, 6<sup>an</sup>, 7<sup>an</sup>, 8<sup>an</sup>, 9<sup>an</sup>, 10<sup>an</sup>, 13<sup>an</sup>, 14<sup>an</sup>,  
15<sup>an</sup> Bacquet.

Divenis la 1<sup>an</sup>, 2<sup>an</sup>, 3<sup>an</sup>, 6<sup>an</sup>, 8<sup>an</sup>, 10<sup>an</sup>, 11<sup>an</sup>, 13<sup>an</sup>, 14<sup>an</sup>, 15<sup>an</sup>  
Warden.

Divenis la 1<sup>an</sup>, 3<sup>an</sup>, 5<sup>an</sup>, 6<sup>an</sup>, 8<sup>an</sup>, 11<sup>an</sup>, 12<sup>an</sup>, 14<sup>an</sup>, 15<sup>an</sup>  
Wieslander.

Divenis la 1<sup>an</sup>, 2<sup>an</sup>, 5<sup>an</sup>, 8<sup>an</sup>, 10<sup>an</sup>, 11<sup>an</sup>, 12<sup>an</sup>, 14<sup>an</sup>, 15<sup>an</sup>  
Ivanickij.

Divenis la 1<sup>an</sup>, 2<sup>an</sup>, 5<sup>an</sup> Aĉjo.

Divenis la 3<sup>an</sup>, 5<sup>an</sup> Karulino.

1<sup>a</sup> premio Malnovulo. *Komercaj leteroj* kaj 6 Num. de *Amerikan  
Esp. Journal* (50 centimoj).

2<sup>a</sup> » Bacquet. *Tria Kongreso* kaj 6 Num. de *British Espe-  
rantist* (kontraŭ 60 c.)

3<sup>a</sup> » Warden. 16 Num. de *Belga Sonorilo* (k. 70 c.)

4<sup>a</sup> » Ivanickij. 1 jaro de *Esperantisten* (k. 40 c.)

### Problemoj solvotaj.

PROBLEMO 17<sup>a</sup> (de Ĵoĉjo). — Mia tuto estas en ĉiu festo :  
mia kapo estas prepozicio kaj fino mia estas pezo. Kio mi  
estas ?

PROBLEMO 18<sup>a</sup> (de l' sama). — Mian tuton konas la sol-  
datoj, mia kapo estas parto de l' korpo, mia korpo estas fino de  
participo kaj mian voston tre ofte oni vidas en urbo.

PROBLEMO 19<sup>a</sup> (de l' sama). — Mia kapo, prepozicio, en  
mia korpo kaj fino rivero fluas, tute mi estas bela kaj utila  
besto.

PROBLEMO 20<sup>a</sup> (de Bacquet). — Kia estas la plej danĝera  
sporto (tiu problemo estas vortludo).

PROBLEMO 21<sup>a</sup> (de l' sama). — Nenia — sen bona —  
Anstataŭigi la streketojn per taŭgaj vortoj, riĉege kunrimantaj.

PROBLEMO 22<sup>a</sup> (de l' sama). — La plej potenca —, ne povas  
diri al la — : jen estas via — .

Anstataŭigi la streketojn per taŭgaj vortoj, riĉege kunrimantaj.

PROBLEMO 23<sup>a</sup> (de Ch. Brunet). — Rivero kaj disdonilo  
montras religiulon ! ?

RIMARKO. — La solvoj de tiuj problemoj estos akceptataj  
ĝis la 1<sup>a</sup> de junio 1908<sup>a</sup>, ĉe :

Ch. Brunet, 59, Cours Victor-Hugo, Bordeaux, France.

Instruistino klarigis al lernantoj la demandon pri  
« videbla kaj nevidebla ».

Ŝajnas, ke ĉiuj komprenis.

ISTRUISTINO: Karolo! Citu al mi ekzemplon de videbla  
objekto.

KAROLO. — ...Mia pantalono.

I. — Bone! Nun — nevidebla?

K. — (*honte!*) ...Via pantalono.

A. B. el Rusujo.

### Diplomitoj.

De S<sup>o</sup> Boitard, nia amiko kaj aboninto en Pierre (Francujo)  
ni ricevis la jenan interesan statistikon pri la atestuloj aŭ  
profesoroj diplomitaj de la S. f. p. E. (atesto pri kapableco):

« En la Julia numero 1906, « *Tra la Mondo* » sciigis, ke 363  
atestitoj estas dissemataj en la 86 departementoj francaj. Nun,  
laŭ « l'Espérantiste », ĝis la unua januaro 1908 oni kalkulas  
509 diplomitajn esperantistojn. Do 146 personoj en 1907 akiris  
la ateston pri kapableco.

Nur 26 departementoj (anstataŭ 31) enhavas neniun kapablulon.  
Jam 6 enhavas dudek aŭ pli diplomitojn.

1 <sup>e</sup>	Seine. . . . .	116
2 <sup>e</sup>	Pas de Calais . . . . .	52
3 <sup>e</sup>	Rhône . . . . .	38
4 <sup>e</sup>	Nord. . . . .	28
5 <sup>e</sup>	Somme . . . . .	21
6 <sup>e</sup>	Côte d'or . . . . .	20

Rimarkigu ni, ke multaj esperantistoj, kies kapableco estas  
bone konata, ne pensis aŭ deziris akiri la diplomon.

BOITARD.

# GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

## GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.



## FLOR'ESPERANTA

LIKVORO DE L'INTERLIGO  
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro  
Ĝi meritas do la konsidon kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE



MARKO LIVERITA.

## CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparajoj kun kinkono, la **CHABLIS QUINA**, deponas maljunigante,  
sed tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEGO. **L. GUYOU & J. FÈVRE**  
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES

LA INTERNACIA TRINKAĴO

## VISKIO ESPERANTO

Registered Trade Mark

Marque Déposée

N<sup>o</sup> 270,042

N<sup>o</sup> 13,195

Registered label N<sup>o</sup> 272,434

LA OFICIALA VISKIO DE LA TRIA KONGRESO

### Buchanan, Scott & C<sup>o</sup>

Garthland Street

GLASGOW (Skotlando).

# Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Sciencia Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,

Genevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesimiloj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Sciencia Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Genevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Gusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).



## LEGU :

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ. — DUONSURDA.

Vidu la 4<sup>an</sup> kovrilan pagon.

# Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

**GRAVA AVIZO.**

**NI** povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj  
ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn.

**NI** akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.

**NI** aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.

**NI** sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.

(Internacia esperantista librejo)

Skribu LEGEBLE — Rememorigu ĈIAM pri via adreso.

## ESPERANTAJ ORGANOI.

**Ĉio Esperantista.** — Praktika kaj komerca. Ĉe S<sup>o</sup> Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

**Espero Katolika.** — Tute Esperante. Unu N<sup>o</sup> afrankia 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

**Espero Pacifista.** — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S<sup>ro</sup> Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

**La Revuo.** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>ro</sup> Zamenhof. — Ĉe Hachette k. K<sup>o</sup>, 79 Bould St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

**Socia internacia Revuo.** — Pritraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

**La Verda Standardo.** — Scienca kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe S<sup>ro</sup> Marich Agoston, Budapeŝt IX. Ŭllői-ut 59. IV, 8.

**Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu.** — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) 3k. por Aŭstrio. Adm. kaj Red.: Praha, Bohemujo.

**L'Espérantiste.** — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

**Esperantisten.** — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta N<sup>o</sup>: 35 cent. (14 Sd.)

**Japana Esperantisto.** — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — N<sup>o</sup> 13, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

**La Lumo.** — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n<sup>o</sup> 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

**Pola Esperantisto.** — Pole kaj Esperante. — 5 fr. (2 Sm.) Warszawa. Hoza, N<sup>o</sup> 40, m. 8.

**Ruslanda Esperantisto.** — Ĉiumonata organo de la S-to «Espero»; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.) Ruslando, St. Peterburgo, Nikolajevskaja, 33.

**Suno Hispana.** — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanias, 11, presejo — Valencia (Espana).

**Svisa Espero.** — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

## ESPERANTEMJ ORGANOI.

**Les Annales politiques et littéraires.** — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

**De Lusthof.** — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

**La plume Sténographique de France.** — Unversala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D<sup>ro</sup>: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

## UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. . . . . 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ tre malmulte da ili akireblaj nur senpere. Kolektoj nekompletaj:

1<sup>e</sup> mankas la Aprila N<sup>o</sup>. . . . . 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2<sup>e</sup> mankas la Aprila kaj Maja N<sup>o</sup>j. . . . . 2,40 Sm.

## DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. . . . . 3,20 Sm.

## UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Ĉarma rakonto de

FRANÇOIS COPPÉE,

Ano de la Franca Akademio,

Tradukita en Esperanto de A. Montrosier.

75 c. — 30 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

## DUONSURDA.

Originala duakta komedio de

JOHANINO FLOURENS,

30 c. — 12 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

## Rekomendataj firmoj.

**ESPERANTA** 80, Rue Mazarine, PARIS 6<sup>e</sup>.  
Bona familia kuirajo je moderaj

**RESTORACIO** prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton

**ANONCAGENTO.** C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».

LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquée à LA PLUS SIMPLE des langues suivant LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

## Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.). Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1,50  
VERVIERS, Place Verte, 20.

## LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto.

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,

33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

## Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

## Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K<sup>o</sup>

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skriblitoj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantaziaĵoj. Preslitoj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K<sup>o</sup> sendos, laŭ peto, presprovajojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.  
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

## Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

## « LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:

ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL,

Berlin, S. Prinzenstr. 95.

## PROPAGANDAJ ORGANOI.

**The American Esperanto Journal.** — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard Station, Boston, Mass. (U.S.A.).

**Antaŭen Esperantistoj.** — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.) Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro, Calle Lártiga, Lima (Peruo).

**La BELGA Sonorilo.** — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1<sup>an</sup> de Septembro.

**The British Esperantist.** — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

**Brazilia Revuo Esperantista.** — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉe la administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.



NI NE RESPONDAS PRO LA GAZETOJ MENDITAJ PER NI.